

№ 19034/1996

ISSN 0032-4361

1

1996

中國報道

EL POPOLA ĈINIO





Neĝo en printempo

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

En 1977 mi estis komencanto en malgranda klaso. Mi trafolumis la gazeton EPĈ, legante nur la titolojn sub la belaj bildoj. Tiam mi komencis legi artikolon, kiu allogis min — malrapide, kun multe da serĉado en mia vortaro. Sed okazis, ke dum tiu tempo mi glitfalis en la ĝardeno kaj la maleolo rompiĝis. Do mi estis devigita sidi hejme dum ses semajnoj. Dum tiu tempo mi senĉese legis la gazeton, serĉante ĉiun novan vorton en la vortaro — multfoje ĝis mi enkapigis ĝin. Mia vortprovizo rapide pligrandiĝis, kaj miaj scioj pri la geografio, historio kaj kulturo de Ĉinio

ankaŭ plimultiĝis.

Mi aliĝis al la Aŭstralia E-Asocio kaj abonis vian gazeton. Dum ses jaroj mi estis sekretario de la asocio; nun mi servas kiel sekretario de la Ekzamena Komitato.

M. ELLYARD
(Aŭstralio)

Mi estas longatempa abonanto de via ŝatata revuo EPĈ. Estas memorinda la 45-a datreveno de ĝia fondiĝo. Kaj pro tio mi esprimas elkoran gratulon al vi.

Ĉu la politika afero estas tabuo? Ne mankas eĉ japanoj, kiuj deziras pli detale scii pri la ma-

sakro en Nankino fare de la japana armeo en la lasta mondmilito.

NAGAOKA ZIRŌ
(Japanio)

Tutkoran dankon pro la unuaj tri numeroj de EPĈ 1995, kiuj bonorde alvenis hodiaŭ, kaj estis akceptitaj ĉe ni kiel varma pano, ĉar dank' al via helpo ni informiĝis pri la granda kulturo kaj historio de la vasta Ĉinio kaj pri ĉio en la senlima Esperanto-mondo.

La legado estas bone organizita inter niaj samideanoj, kiuj pasigas la revuon de mano al mano, ke ĝin ĉiuj havu eblecon legi.


IRENE SZÜCS
(Rumanio)

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
 4 Novjara saluto
 5 *EKONOMIE:*
 Leĝoj pri bankoj de Ĉinio
 6 Tibeto, plej proksima al la suno
 8 Campinasaj esperantistoj aktivas
 9 *ESP-NOVAĴOJ*
 10 *VOĈO DE E-ISTOJ:*
 Junularo kaj tradicia kulturo
 Lastaj inkunabloj serĉataj
 12 *POR KOMENCANTOJ:*
 Mia kateto
 13 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
 Aktivulo de Esperantujo
 16 Paco, eterna temo de esperantistoj
 20 *EN ĈINAJ URBETOJ:*
 Inceĉsfumo kaj kuirfumo
 21 *KORESPONDI DEZIRAS*
 24 La mondo pri loĝantaro
 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*
 Duan-festo de ŝuj-oj
- 28 Turismo kaj feriado
 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*
 Eterne ĉarmas la Silka Vojo
 36 La Historia Muzeo de Shaanxi
 38 *ĈINA KULTURO:*
 1996 — la jaro de muso
 40 Universitato por maljunuloj
 42 *MIA VIVO:*
 Senbrakulo kapabla je pentrado
 43 Organa grefto en Ĉinio
 44 Elstara urokirurgo Wu Jieping
 46 *KURANTAJ AFEROJ*
 48 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
 49 Ŝipista familio sur Huaihe-rivero
 50 *GALERIO:*
 Bronza artaĵo
 SUR LA KOVRILO:
 Tibetaj knabinoj
 Foto de **Liu Sigong**
- 2 Neĝo en printempo
 SUR LA DORSKOVRILO:
 La Riverrigarda Kiosko sur
 Lushan-monto

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Tibeta Aŭtonoma Regiono
(p. 6)
2. Jiuhua (p. 20)
3. Sanya (p. 28)
4. Xi'an (p. 36)
5. Huaibin-gubernio (p. 49)





TAN XIUZHU*:

Novjara saluto

La aŭtoro

KARAJ legantoj, ĉe la sojlo de la Nova Jaro 1996, mi kaj miaj kolegoj en la redakcio kore salutas vin kaj deziras al vi sanon, feliĉon kaj ĉion bonan.

En la pasinta jaro mi partoprenis la 80-an UK kaj havis ŝancon renkontiĝi kun niaj legantoj el diversaj partoj de la mondo, aŭskulti iliajn opiniojn pri la revuo *El Popola Ĉinio* kaj estis ege kortuŝita de ilia amikeco kaj varma subteno al la revuo. Ĝuste pro tiuj subteno kaj amikeco, nia redakcio venkis multajn malfacilaĵojn kaj eldonis la revuon normale. En la pasinta jaro ni sukcese transprenis la distribuadon de la revuo de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio kaj bremsis malpliigon de la nombro de la abonantoj. Ĉi-rilate la Fondaĵo EPC-abono ludis gravan rolon. Retrorigardante nian laboron, ni sentas ĝojon kaj profundan dankon al niaj legantoj, perantoj, mondonacintoj de la fondaĵo kaj aliaj samideanoj.

En 1996 ni daŭre raportos al vi pri reformado de Ĉinio, kiu ampleksas politikon, ekonomion, kulturon, ideologion kaj aliajn kampojn. El la raportoj vi informiĝos pri progreso de Ĉinio kaj ankaŭ pri la problemoj alfrontataj de ĝi en la nova situacio.

Eble vi bone memoras, ke en la revuo 1989-1991 aperis serio da artikoloj pri la suda Silka Vojo, kiu serpentumis en montaroj kaj primitivaj arbaroj. La raporto-serio tre interesis niajn legantojn. Leginte ĝin, iuj montris deziron vojaĝi laŭ la Silka Vojo, kaj aliaj esperis, ke ni aperigos aliajn artikolojn pri ĝi. Inspirite de tio, ni iniciatis ĉi-jare la novan raporto-serion pri alia pli fama Silka Vojo tra iranta la dezerton en nordokcidenta Ĉinio. Tiu Silka Vojo komenciĝis de Xi'an, la antikva ĉefurbo de Ĉinio, oriente kaj finiĝis ĉe Konstantinopolo (la nuna Istanbul) okcidente. En la antikveco ĝi estis vojo por komerco kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Okcidenta Azio, Meza Oriento kaj Eŭropo. Ni planas fini la raporton en tri jaroj. En tiu tempo vi kune kun niaj raportistoj vizitos antikvajn movoplenajn komerc-centrojn, kurierajn vojojn kaj staciojn, kulturajn ruinojn, historiajn restaĵojn kaj ĝuos kuriozajn pejzaĝojn ambaŭflanke de la vojo.

Ni esperas, ke la raporto havigos al vi pli da scioj pri la longa historio kaj brila kulturo de Ĉinio. Kompreneble, krom la pasinteco de la Silka Vojo, ni raportos ankaŭ ĝiajn estantecon kaj estontecon.

Ĝenerale niaj Esperantaj rubrikoj estas bonvenaj al la legantoj. Ili daŭros en la nova jaro, tamen plibonigendas. Ĉi tie mi volas iom paroli aparte pri la rubrikoj "Ĉinaj E-istoj" kaj "Originale Verkitaj".

Post kiam Ĉinio malfermis sian pordon al la mondo, ĉinaj esperantistoj tre deziras koni la eksteran mondon. Por plejparto de ili vojaĝi al aliaj landoj kaj partopreni en UK portempe estas malfacile realigebla revo. En la pasinta jaro ni starigis la rubrikon "Ĉinaj E-istoj" cele doni al ili la ŝancon konatiĝi kun Esperantaj amikoj kaj konigi al alilandaj esperantistoj, kiel vivas kaj laboras ordinaj ĉinaj esperantistoj. Ĉi-jare ni daŭre prezentos al vi malsamaĝajn kaj diversaprofesiajn esperantistojn de Ĉinio, inter kiuj estos juna ĉina esperantisto Mao Zifu, kiu ricevis premion "Nova talento" en Belartaj Konkursoj de UEA 1995 pro siaj poemoj "La tuta vivo" kaj "Fendo".

Ni malfermis ankaŭ la rubrikon "Originale Verkitaj" por niaj samideanoj, kiuj amas literaturon kaj literaturan verkadon, kun espero fari nian modestan kontribuon al Esperanta literaturo. La sukceso de la rubriko dependas de kuna penado de ni kaj vi. Tial viaj kontribuoj por ĝi estas petataj. Ni bezonas kuraĝigon kaj subtenon far eminentaj Esperantaj verkistoj kaj poetoj, kaj samtempe, ni esperas, ke junaj esperantistoj prenos la rubrikon kiel terenon por sin ekzerci kaj montri sian talenton.

Inter la 22-a kaj 25-a de aŭgusto 1996 okazos en Ŝanhajo la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Tio sendube estos grava afero por la azia Esperantomovado. Ni certe raportos ĝin en nia revuo. Kiel la gastiganto de la kongreso, ni varme bonvenigas niajn legantojn kaj aliajn samideanojn de la mondo partopreni la kongreson kaj gastigi ĉe nia redakcio.

Fine mi deziras pacon al la tuta mondo en 1996!

*Vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio".

GRANDA afero por la ĉina financa rondo estas, ke la ĉina registaro publikigis respektive Leĝojn pri Popola Banko de la Ĉina Popola Respubliko kaj Leĝojn pri Komercaj Bankoj de la Ĉina Popola Respubliko en 1995 (sube mallongigite Leĝoj pri centra banko kaj Leĝoj pri Komercaj Bankoj).

Estas bone konate, ke en multaj jaroj la planizita ekonomio ludis gvidan rolon en la ĉina ekonomia konstruado. Banko, en rolo de financa kalkulo, ne estis multe atentata de la publiko. Ĝi impresis kiel monsako. Kiam Ĉinio eniris en trakon de la merkata ekonomio, pro manko de koncernaj leĝoj, aperis pli kaj pli multaj problemoj en la financa merkato. Ekzemple la registaro supertratas bankojn; la bankoj batalis inter si per interezoj por gajni pli da deponita mono; miksiĝis la politikaj kaj komercaj laboroj unu kun la alia en fakaj bankoj ktp. Samtempe kun tio, la nombro de bankoj kreskis de 4 ĝis dekelkaj kaj la nombro de iliaj filioj en aliaj landoj atingis pli ol 500. En la fino de 1994 estis 118 administraj filioj de fremdlandaj financaj establoj sur la ĉina ĉeftero. Tial Ĉinio urĝe bezonis ellabori siajn proprajn financajn leĝojn por kategoriigi agojn de la bankoj. Ĝuste sub tiu situacio naskiĝis la supre menciitaj leĝoj pri bankoj.

La publikigo de Leĝoj pri centra banko montris, ke Ĉinio finfine havas tian aŭtoritatan centran bankon kia sub la okcidenta merkata ekonomia sistemo, kompreneble ĝi portas propran trajton de Ĉinio.

Unue, Leĝoj pri centra banko klare difinis la devon kaj rajton de la Ĉina Popola Banko kiel centra banko en financa makroreguligado kaj laŭleĝe garantias la aŭtoritatecon de la centra banko en ellaborado kaj plenumado de monopolitiko, ke ĝi sub la gvidado de la centra registaro, t.e. la Ŝtata

LEĜOJ PRI BANKOJ DE ĈINIO

de LI ZEJUN

Konsilantaro, evitu intervenojn fare de aliaj departementoj kaj lokaj registaroj.

Due, la leĝoj entenas difinon pri monopolitika sistemo kaj donas organizan kaj teknikajn garantiojn. A. La celo de ĝia monopolitiko estas "teni stabilecon de la valoro de mono por akceli ekonomian kreskon"; B. Starigi monopolitikan komisionon; C. La iloj por plenumi monopolitikon ampleksas preparan monon de deponita mono, norman interezon kaj diskontadon, rekrediton, publikigon de merkataj laboroj.

Krome, la leĝoj liveras al la centra banko leĝan bazon de financa kontrolo, malpermesas supertraton fare de la registara financo kaj kontuloj de financaj establoj ktp.

Leĝoj pri Komercaj Bankoj estas kaj protektanto kaj detenanto por tiuj bankoj. La leĝoj havas jenajn trajtojn:

1. Ili emfazas defendon de intereso de la komercaj bankoj kaj la deponintoj.

2. Banko estas klare difinita kiel jura persono de entrepreno. Banko ja estas limigita korporacio. La ŝtato ne plu portas sur si senliman riskon. Banko devas kun la tuta posedaĵo de sia jura persono memstare porti civilan devon.

3. La administraj principoj de la komercaj bankoj montriĝas kiel efikeco, sekureco, cirkulado kaj memstara administrado, mempor-

to de risko, memrespondo pri gajno aŭ perdo kaj memregado.

4. La normo de registrita kapitalo estas pli alta ol la okcidenta. Starigi organon por ekzameni procedon. Permesi aĉeti limigitecon de akcioj de bankoj. Komercaj bankoj kun solkapitalo de la ŝtato devas fondi kontrolan konsilion.

5. Dispartigi la laborojn de banko, kredito kaj valorpapero.

6. Konekti laborajn regulojn kun internaciaj konvencioj, ekzemple praktiki proporcian administradon pri ŝuldoj de kapitalo. La sufiĉeco de kapitalo ne devas esti malpli ol 8% kaj la rilatumo inter deponita mono kaj kredito ne devas superi 75% ktp. Por garantii justan konkuradon, estas limigite doni krediton al koncertatoj.

7. En la leĝoj estas klaraj difinoj pri dispartigo, kuniĝo, disiĝo, kalkulo kaj eĉ bankrota procedo de banko. Estas ankaŭ leĝaj artikoloj por puni la bankojn, kiuj kontraŭis al kontrolaj leĝoj kaj kaŭzis damaĝojn al klientoj, kaj ankaŭ krimfarajn laborantojn.

La publikigo de Leĝoj pri centra banko kaj Leĝoj pri Komercaj Bankoj montris, ke la pozicio kaj rolo de la bankoj en la nacia ekonomio rimarkinde plifortiĝis kaj unuapaŝe formiĝis la financa organiza sistemo, kiu prenas la centran bankon, t.e. la Popolan Bankon, kiel gvidanton kaj la ŝtatajn

(Daŭrigo sur p. 12)

Tibeto, plej proksima al la suno

TIBETO, situanta sur la “monda tegmento”, pli ol 4 000 m super la marnivelo, kun sunbrila tempo de 3 100-3 400 horoj jare, estas nomata la loko plej proksima al la suno.

Hodiaŭ, la loko, kiu sin liberigis el mallumo de la socio en la 50-aj jaroj, rapide progresas, tiel ke pli kaj pli multaj turnas la atenton sur ĝin.

GRANDAJ ŜANĜIĜOJ EN LA 30 JAROJ

Julie de 1982, Bainqen Erdini la Deko, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, flugis de la landinterno al Tibeto por inspektado. En la aeroplano li, flanken kliniĝinte, absorbite rigardis malsupren tra fenestro ondantan montaron kaj pretervole rememoris sian unuan revenon al Tibeto.

Tio okazis en 1951, Bainqen, longe restinte en la landinterno, revenis al Tibeto laŭ la invito de la registaro de Tibeto. Tiam en Tibeto ne troviĝis ŝoseo nek aerolinio. Pli ol 10 000 kameloj, gruntbovoj kaj ĉevaloj servis kiel trafikiloj por li kaj liaj pli ol 2 000 sekvantoj. Ili ekveturis en la jarfino de Xining (Ŝjining), ĉefurbo de Qinghai (Ĉinghaj)-provinco, kaj atingis Lhasa post 4 monatoj. El tio oni povas vidi, kiel estis malfacile veturi al Tibeto kaj kiel postginta la loko.

Post la Paca Liberiĝo de Tibeto en 1951 kaj la tiera Demokratia Reformado en 1959 la multe suferin-

ta Tibeto reviviĝis kaj aperis en ĝi multe da plejoj de Ĉinio kaj eĉ de la mondo:

La plej granda tervarma elektrejo de Ĉinio — la 25 180-kilovatta tervarma elektrejo Yangbajan; la plej granda sunenergia elektrejo de Ĉinio — Geji-elektrejo kun generatora kapacito de 10 088 kilovattoj; la plej granda bazo de kromoferito de Ĉinio — Luobusa-kromoferito; la plej longa oledukto de Ĉinio — la 2 080-kilometra oledukto inter Qinghai kaj Tibeto; la hidroelektrejo Yangzhuoyonghu kun totala projekta generatora kapacito de 90 000 kilovattoj — la plej alta super la marnivelo de la mondo; Gonggar-aerodromo, moderna internacia aerodromo — la plej alta super la marnivelo en la mondo...


Krom la supre diritaj, okazis ankaŭ multaj aliaj mirakloj sur la mistera altebenaĵo kun areo de 1.2 milionoj da kvadrataj kilometroj.

Tiam en Tibeto estis neniuj ŝoseoj. Varoj estis transportitaj per brutoj kaj eĉ la servutuloposedantoj estis dorse portataj de servutuloj por viziti alian lokon, antaŭ la Demokratia Reformado. En la pasintaj 30 jaroj la ŝtato investis pli ol 5 miliardojn da juanoj por konstrui ŝoseojn. Nun en Tibeto etendiĝas ŝoseoj kun totala longo de 22 300 km. Ĉiuj gubernioj kaj 77% de la distriktoj interkomunikiĝas per ŝoseoj kaj formiĝis ŝosereto kun Lhasa kiel la centro. De Lhasa oni povas flugi al Pekino, Chengdu, Chongqing (Ĉongĉing) kaj Katmanduo. En ĉiuj gubernioj de la regiono funkcias satelita telekomunika terstacio.

Antaŭ la Paca Liberiĝo Tibeto ne povis produkti eĉ najlon, kaj en ĝi estis preskaŭ neniuj industrioj. Nun, elektra, tekstila, metalurgia, konstru-materiala, maŝina kaj metia industrioj dislokiĝas en Tibeto.

Tibeto abundas je akva, tervarma, venta kaj suna energioj, tamen la tibetaj kamparanoj kaj paŝtistoj uzis olelampon por lumigo dum pli ol mil jaroj, kaj la paŝtistoj sur stepo hejtis per seka fekaĵo de bovo jaro post jaro. En la 30 jaroj post la Demokratia Reformado transmisiaj elektraj fadenoj etendiĝis ĉie sur la Tibeta Altebenaĵo. Elektra lampo estis uzata en ĉiuj paŝtistaj domoj. Koloraj televidiloj, lavmaŝinoj, ventumiloj, draŝmaŝinoj kaj mueliloj estis vaste uzataj. Nun en la regiono la kamparanaj kaj paŝtistaj familioj havas meznombre fiksan produktan kapitalon de 8 000 juanoj kaj 75 brutojn, ĉiu centa familio — 3.16 aŭtojn kaj ĉiu deka familio — unu traktoron. La totala produktovaloro de agrikulturo kaj brutobredado kreskis de malpli ol 500 milionoj da juanoj antaŭ 30 jaroj al 2.32 miliardoj da juanoj en 1994.

La ŝanĝiĝo de la sorto de la 2.3 milionoj da tibetanoj estas plej evidenta. La kodo de la malnova Tibeto dividis homojn en 3 gradojn el 9 klasoj. Ĝi difinis la sorton de tibetanoj jam ĉe ilia naskiĝo. En la hodiaŭa Tibeto ĉiuj tibetanoj estas egalrajtaj kaj ĉiu povas elekti sian socian rolon laŭ sia volo. Multaj tibetanoj fariĝis sciencistoj, literaturistoj, artistoj, sportistoj, advokatoj... Centoj da miloj da diversnivelaĵaj tibetaj kadroj aktivadas en la kampoj de superstrukturo kaj



En Lhasa

ekonomia bazo. Tibetanoj kaj aliaj nacimalplimultanoj konsistigas pli ol 80% de la popolaj reprezentantoj de la regiono. Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso de la regiono, prezidanto de la registaro de la regiono kaj ĉiuj ĝiaj guberniestroj estas tibetanoj kaj aliaj nacimalplimultanoj.

Pingcuo Ciren kaj liaj familianoj estis denaskaj servutuloj de la gubernio Duilongdeqing. Nun li konstruis antaŭ la ruinigita bieno domon el 6 ĉambroj, kies skalo kaj instalaĵaro multe superis tiujn de la loĝejo de la iama bienposedanto. Kuŝas abisma malsameco inter la vivo de Pingcuo kaj tiu de lia patro, kiu tutjare laboregis, sed havis pli kaj pli multe da ŝuldoj. Kompreneble, liaj posteuloj estos pli feliĉaj ol li. 3 el liaj 4 gefiloj studas en alilokaj universitatoj. Lia unua filino Dawa, diplomiĝinte el universitato, laboras en la kamparo kiel ŝtatoficistino.

TRI KONSTRU-TAJDOJ

En la 30 jaroj leviĝis 3 konstrutajdoj en Tibeto.

La unua konstru-tajdo komenciĝis en la 50-aj jaroj per konstruado de la ŝoseo inter Sichuan kaj Tibeto kaj tiu inter Qinghai kaj Tibeto. Tio akcelis la disvolviĝon de ŝosereto, elektro-energio, konstru-materialo, eduko kaj higieno. Dank' al senkompensa kredito de la registaro al agrikulturo kaj grandkvanta produktado de feraj agrikulturiloj, leviĝis produktaj fortoj de agrikulturo kaj brutobredado.

La dua konstru-tajdo kun 43 projektoj, difinitaj de la ŝtato en 1984 por helpi Tibeton, inkluzivis la konstruadon de la grandioza Yangzhuoyonghu-hidroelektrajo, pligrandigon de Gonggar-aerodromo kaj sintezan reordigon de la riveroj Yarlung Zangbo, Lhasa kaj Nianchu, kion la tibeta popolo nomas "Projekto de Ora Ŝlosilo".

En la 90-aj jaroj, per 6 miliardoj da juanoj investitaj de la ŝtato, Tibeto komencis grandan konstruadon de agrikulturo, energio, trafiko, poŝto kaj telekomuniko. Tuj sekvis 62 projektoj plenumataj de diversaj partoj de la lando por helpi Tibeton, kun totala investo de 2.38 miliardoj da juanoj. Nun jam plenumiĝis 40 projektoj. La rekonstruado de la placo de Potala-palaco estas projekto, kiu plibeligas la urbon, donas kondiĉojn por pluapaŝe malfermi Lhasa al la eksterlando kaj disponigas ripozejon kaj amuzejon. Tio estas ankaŭ grava rimedo por protekti la tradician nacian kulturon.

TIBETO AL LA MONDO

Tibeto kun landlima linio de ĉ. 4 000 km tuŝas Hindion, Nepalon, Sikimon, Butanon, Birmon kaj Kaŝmiron. De miloj da jaroj viglas foiroj ĉe la landlimo. Cent specoj da agrikulturaj kaj brutaj produktajdoj de Tibeto, kiaj ŝaffeloj kaj drogoj, eksportiĝas kaj multaj alilandaj komercaĵoj importiĝas tra landlimaj havenoj. Ĉiujare multe da pilgrimantoj kaj turistoj vizitas Tibeton. Komence de la 60-aj jaroj

Yadong kaj aliaj havenoj fermiĝis. Komence de la 80-aj jaroj remalfermiĝis 27 ĉinaj havenoj, kiaj Zhangmu ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo kaj Pulan ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio. Ankaŭ la tradiciaj internaciaj foiroj, inkl. de Shannan, Yamarong kaj Dalong, refunkciis unu post alia.

Komercistoj ĉinaj kaj eksterlandaj konkure vendis agrikulturajn, brutajn kaj tekstilajn produktaĵojn en la landlimaj foiroj. Diversaj entreprenoj partoprenis la landliman komercon. En la lastaj jaroj la monsumo de la popola kaj ŝtata komerco kreskis duoble ĉiujare kaj konsistigis 70% de la totala ekstera komerca monsumo de Tibeto.

Sendube, kun pliboniĝo de la investa medio kaj praktiko de serio da favoraj politikoj kaj rimedoj kuraĝigi en- kaj eksterlandajn komercistojn al investado en Tibeto, Tibeto montris superecon en komercado. La ekonomia kaj komerca buroo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono adoptis la politikon veturi sur maro per pruntita ŝipo. Ĝiaj filioj starigis oficejon en plejparto de la marbordaj urboj de Ĉinio kaj agentejon en Hongkong, Japanio k.a. Ĝi negociis kun komercistoj el Eŭropo, Ameriko, Japanio kaj Sudorienta Azio. Sole en 1994 la totala importaĵa kaj eksportaĵa monsumo de Tibeto atingis 350 milionojn da usonaj dolaroj, kio ludis gravan rolon por prosperigi la tibetan ekonomion. Tibeto iras al la mondo. ■

Campinasaj esperantistoj aktivas

POST la E-ekspozicio, okazinta je la 23-25 nov/94 en la biblioteko de la Regiona Tribunalo pri Laborjustico en la urbo Campinas, ŝtato San Paulo, Brazilo, la tiea intereso por Esperanto kreskadas.

Je la 30-a de marto/95 oni komencis en la Tribunalo kurson de E-o por 26 funkciuloj. Okaze de la unua leciono, ĉeestis ne nur la 26 lernantoj, sed ankaŭ la administranto de la Eldonejo kaj Librejo, kiu ekde nun ne nur ekzorgas pri la Esp-libro-komercado, sed ankaŭ ekstudas la E-kurson. Ĉeestis ankaŭ urba konsilanto, kiu ekapogas nian movadon. Krome, ĵurnalistinoj el du televidaj retoj, intervjuis min kaj faris bonegajn raportojn elsenditaj tra la ŝtato San Paulo.

Sur la fono estas portugallingva afiŝo en restoracio de Campinas, signifanta "Lernu Esperanton".

Krom tiuj 26 novaj lernantoj, ankaŭ aliaj 23 homoj inter funkciuloj kaj urbanoj eklernas E-on pere de la koresponda kurso de la Brazila E-Ligo.

La Tribunalo pere de sia event-sekcio disdonis internan cirkuleron pri la kurso kaj zorgis pri la aranĝo, kaj ĝia sekcio pri gazetara servo zorgis pri la aranĝo rilate al televidaj retoj kaj ankaŭ pri la altkvalitaj kaj allogaj afiŝoj pri la kurso. Sed la tutan sukceson de la okazaĵoj ni ŝuldas unue al sindonemaj geedzoj juĝisto D-ro Adilson Bas-salho Pereira kaj s-ino Iza Gemha A. Pereira, kiuj ekde oktobro/94 apogas nian movadon; pro iliaj rektaj influoj kaj apogo oni sukcesis instrui Esperanton ne nur ene de la Tribunalo, sed ankaŭ en komforta aŭditorio, ekipita per son-

aparato, vidbendo, televidilo, klimatizilo ktp; s-ino Iza, ĉefino de la event-sekcio, diris al mi, ke oni starigos novan klason kaj ankaŭ ŝi lernos en ĝi Esperanton.

Je la komenco de marto ni fiksis 85 afiŝtabulojn tra la plej gravaj avenuoj de la urbo kaj antaŭ la ĉefaj lernejoj. Sur la afiŝoj en la portugala lingvo legiĝas "Lernu E-on." Kelkaj lernejoj jam taskis al siaj lernantoj fari esploron pri E-o. Eĉ en la universitato Unicamp, kie mi studas, multaj lernantoj kaj kelkaj profesoroj jam komentarias la ordonemajn afiŝojn kaj la lingvon.

En nov/94 post interkonsento kun komercisto Edson Furian, posedanto de lunĉejo Papamelos tre vizitata de junuloj, mi sukcesis ricevi permeson pentrigi tie, sur videbla muro, allogan reklamon longan je 3.5 metroj: Lernu ESPERANTON, lingvon por amikiĝi, fari negocojn kaj havi geamantojn internacie.

S-ro Furian entuziasmiĝis kaj en februaro/95 partoprenis en la koresponda kurso de la Brazila E-Ligo.

Mi profitas la okazon por peti ĉiujn e-istojn kaj E-eldonistojn donaci novajn aŭ malnovajn librojn, por ke ni kreskigu la E-sekcion starigitan en nov/94 en la tribunala biblioteko. Mi petas ankaŭ gekantistojn laŭeble donaci sonbendan ekzempleron, por ke mi disvastigu la E-muzikon en nia regiono.

Ĉiujn donacajojn kaj ankaŭ E-katalogojn bonvole sendu al: Juscelino Gama, poŝtkesto 532 Campinas — SP — Brazilo BR 13001-970. ■



ESP-NOVAĴOJ

● La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis la poŝtmarkoseriojn "Osmanto", "La 43-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso", "Printempa Vojaĝo de Lordino de Guo-regno", "Ombroteatraĵoj de Ĉinio" kaj "Aŭtovoĵaj Trefkruciĝoj de Pekino" respektive en aprilo, majo kaj junio 1995. La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisiaj tagoj poŝtstampilojn en Esperanto kaj en la ĉina lingvo, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui.

(Ĝang Linĵuj).

Memorigaj poŝtstampoj desegnitaj de s-ro Zhang Linrui



● Prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, gajnis la premion "Amikeco" aljuĝitan de la ĉina registaro en 1995. Por akcepti ĝin, li speciale venis en Pekinon la 27-an de septembro.

Por glorigi alilandajn fakulojn kaj elmigrantajn ĉinojn, kiuj faris gravajn kontribuojn por la ĉina ekonomia konstruo, la ĉina registaro starigis en 1991 la premion "Amikeco". 40 fakuloj el 17 landoj estis premiitaj en 1995. Ĝis nun jam 274 personoj ricevis tiun premion. (Dai Song'en)

● Akademia centro de administrado, entreprenado kaj juro eldonis juran vortaron (Esperante-ruse-ukraine-angle) en Slavjansk, Ukrainio. En ĝi estas 2 587 terminoj: administra, aŭtora, civila, diplomatia, familia, financa, hereda, kriminala, labora, mara, milita kaj patenta juro. Prezo: 59,70 gld. La vortaro aĉetebblas ĉe UEA. (Mikelo Popov)

● Ĝis la 21-a de januaro 1996 "Esperanto-Klubo Den Helder" ekzistis jam 15 jarojn. Por organizi ekspozicion por reklami Esperanton, la klubo petas kiel eble plej multajn gratulajn kartojn kaj leterojn kaj aliajn interesaĵojn. Ĉiuj sendintoj ricevos respondon! La adreso estas: "Esperanto-Klubo Den Helder", Postfako 40, NL-1780 AC Den Helder, Nederlando. (K.J. Klein)

● Rumana Esperanto-Asocio

por Sano (REAS) oficialiĝis je la fino de 1994. La ĉefaj celoj de la asocio estas diskonigi Esperanton tra medicinaj rondoj, akiri kontaktojn kun similaj organizoj el la tuta mondo. La asocio eldonas dumonatan revuon "Medicina Informilo". La jara abono estas 20 internaciaj respondkuponoj (IRK). Por la poŝta sendado aldonu 2 IRK. La revuo estas abonebla ĉe la prezidanto de REAS kaj ĉefredaktoro D-ro Chirita Caius, C.P. 35-3, Bucures-ti, Rumanio. (Gabor Lazar)

● Esperanto-Kurso en Universitato Antananarivo de Madagaskaro komenciĝis la 6-an de majo 1995 kun multaj partoprenantoj el diversbranĉaj studoj: franca, angla, germana, rusa, geografia kaj jura. La studentoj lernas kun entuziasmo, esperas daŭran kurson kaj deklaras la valoron de Esperanto, kiu faciligas la studadon de aliaj fremdaj lingvoj.

(Rabevazaha Desire)


● Martinus-Instituto, Kopenhago, Danio, eldonis novan revuon "Kosmos" por informi pri "La Kosmologio de Martinus", kiu prezentas logikan vivklarigon kondukantan al pozitiva vivsinteno kaj al pacaj kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. "Kosmos" aperas 4 fojojn jare. Petu senkoston provkzempleron ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio. (Poul Dyrholm)

Esperanto-kurso en universitato en Madagaskaro



Junularo kaj tradicia kulturo

de **MATEN. O** (Koreio)



S-ro Maten. O

1. PROLOGO

Estas fakto, ke nia aspekto, nia religio, nia pensado kaj nia arto estas influitaj de la okcidenta kulturo.

Fizike, sango, osto kaj karno estas hereditaj de nia antaŭulo. Sed, kulturo estas influita de la okcidento.

Se iu volas serĉi kaj kompreni nian tradicion de nacia kulturo, oni miskomprenas, ke ni sekvas ekskluzivecon kaj ŝovinismon.

Ĉu la diro pri tradicia kulturo signifas konservemon? Por ricevi ĝustan respondon al la demando, ni esploru, kio estas tradicia kulturo, kaj kiel ĝi estas komprenita.

2. KONCEPTO KAJ INFLUO DE KULTURO

Nia kompreno pri la mondo signifas, ke ni faras ordon kaj ordigas ĉion laŭ la sistemo. Ŝanĝi la kaoson al la ordo estas nia kompreno. Sed nia socio havas jam preparitan ordon en ĝi. Nome sociada proceso estas lerni, trejni, ordigi aŭ ŝanĝi la ordon. Ĉi tiu socia ordo, kiu ordigas niajn travivaĵojn, estas la kulturo. Tial kulturo ordigas homan agon.

Oni diras, ke kulturo fluas de altejo al malaltejo. Estas ekzemplo, ke iu konkeras progresintan nacion je politiko aŭ armeo, tamen konkerinto estas konkerita de la konkerita kulturo. Ofte okazas, ke progresinta nacia kulturo konkeras aliajn malprogresintajn kaj fariĝas internacia kulturo.

Sed se iu demandas: "Ĉu vi estas konkerita en kulturo?", ni respondas: "Malgraŭ ke la kulturo de alia nacio kaj la internacia kulturo influas nian kulturon, nia kulturo ne estas absorbita aŭ konkerita. Ni konservas originalecon de nia nacia kulturo.

3. TRADICIO KAJ NUNECO

Tradicio estas heredaĵo de pasinteco. Ĉi tiu tradicio kunestas kun la socio kaj personoj, kiuj konsistigas la socion. Tial tradicio influas ĉiam nian realecon. Ni devas vidi heredaĵon de pasinteco, kritikante ĝin laŭ objektiva vidpunkto. Tra la kritiko ni devas diferencii de tiu, kiu sin dediĉas al kreo de kulturo kaj tradicio.

En iu senco tradicio ne estas fiksa kaj neŝanĝebla, ni prefere serĉas kaj kreas tradicion. Ekzemple tio, kio estas pensita elstara tradicio de kulturo en pasinteco, estas forĵetita en posta generacio. Kontraŭe tio, kio estas forĵetita en pasinteco, estas alte taksita en nuneco.

4. TRADICIO KAJ KREISMO

Oni ne povas diri unuvorte, ĉu tradicio estas mia aŭ via, ĉu ĝi estas akceptebla aŭ ne. Ni forĵetis tion, kio ne taŭgas por kreskado. Sed ni akceptas tion, kio estas necesaĵo por ni, por nia tradicio. Tial ne estas problemo, kie ni akceptas alian kulturon, estas problemo, kiel ni akceptas ĝin. Ni devas akcepti ĝin por nia progreso.

Se ni akceptas alian kulturon laŭ originala vidpunkto, ĝi ne estas

alia, sed estas nia. Estas ĉefa laboro rompi konvencion de pasinteco kaj krei novon. Unuvorte, nia naci-kultura tradicio estas heredaĵo en senfina kreado.

5. KONKLUDO

Neglekti naci-kulturan tradicion iasence estas malbona antaŭjuĝo, kiu devenas de sin-malamo. Heredi tradicion de nacia kulturo ne estas ekskluziveco nek ŝovinismo.

Kulturo estas progresema kaj ne estas neŝanĝebla fiksaĵo. Tre teni pasintecan kulturon estas kontraŭaĵo je evolucio de kulturo. Do ni devas teni ĝustan kritikismon.

Nova kreo de kulturo ne estas teni simplan pasintaĵon nek simplan mokadon de alia kulturo. Alia kulturo povas lumi tradicion de kulturo.

Ni junuloj devas teni amon al nia kulturo kaj koni multon de nia kulturo. Ni junuloj devas ankaŭ havi senfinan kreaĵon spiriton. Senfina krea spirito volas akcepti progresintan kulturon. Nova kreo de kulturo povas doni pacon al nia mondo. Paca kulturo povas lumi tradicion de kulturo. Ni junuloj devas fari bonan kulturon kaj akcepti pacan kulturon de alia lando. Kaj ni beligu per la juneco nian mondon kun bona paca kulturo.

La aŭtoro estas juna korea e-isto. Tiu ĉi artikolo estis mallongigita prelego por la 14-a Komuna Seminario de Koreio, Japanio kaj Ĉinio okazinta en Tianjin, Ĉinio, la 11-14-an aŭg. 1995.

Lastaj inkunabloj serĉataj

— Alvoko por kompletigi LD

de REINHARD HAUPENTHAL (Germanio)

En julio 1995, 108 jarojn post la Unua Libro, aperis la 17-a volumo de la serio **Ludovikologia Dokumentaro (LD)**. Sub ĉi titolo kaŝiĝas grandioza kultur-evento apenaŭ rimarkata de la averaĝa esperantisto. La japana esperantologo Itô Kanzi, post la eldono de la kompleta verkaro de Zamenhof, entreprenis rehavigi ĉiujn Esperantajn broŝurojn aperintajn antaŭ 1900, la t.n. inkunablojn de Esperanto. Dank' al la kunhelpo de kelkaj specialistoj preskaŭ ĉiuj 118 titoloj inkunablaj retroviĝis kaj aperis faksimile en la LD-serio. Preskaŭ, sed ankoraŭ ne ĉiuj.

En la ĵusa volumo (p. 527) Itô starigas du listojn de ankoraŭ serĉataj inkunabloj. Pri kiuj verkoj temas?

Listo 1: verkoj ankoraŭ tute ne trovitaj

Ili estas la numeroj 32, 42, 50, 65 kaj 102. (Ĉi numeroj rilatas al la t.n. "Nomaroj", en kiuj Zamenhof listigis la frutempajn eldonaĵojn.)

Listo 2: unuaj eldonoj serĉataj

Ili estas la numeroj 52, 53, 68 kaj 110. (Postaj eldonoj konatas kaj jam aperis faksimile.)

Ni iom okupiĝu pri ĉi "fantomaj" verkoj en la espero, ke iuj legantoj niaj sukcesos nin helpi en la trovo de la originaloj.

Inkunablo 32: Marietta FROLLO: Dictionar international pentru romani. Vortaro por Rumanoj. /Varsovio: Kelter 1889./ 1 folio grand-formata. (Kp. Bibliografio..., p. 18; BIL 2971.)

Kredeble temis pri unuopa folio (A3), simila al tiuj aldonitaj al la diversaj Unuaj Libroj. Nek la universitata biblioteko de Varsovio nek tiu de Bukareŝto posedas ĝin. Ankaŭ DAVIDOV ne listigas ĝin. Precipe la polaj kaj rumanaj esperantistoj devus traesplori ĉiujn arkivojn kaj bi-

bliotekojn.

Inkunablo 42: L. L. Zamenhof: Wörterbuch der internationalen Sprache. Deutsch-internationaler Theil. Meza vortaro germana-internacia. /Varsovio?/ 1891. 66 p. (Kp. Bibliografio..., p. 21; BIL 2423.)

DAVIDOV ne konas ĝin. Provoj ricevi ĝin per la interbiblioteka prunto-servo fiaskis. UB Varsovio ne posedas ĝin.

Mi mem emas supozi, ke ĉi verko neniam aperis. Sed necesas plu erpi en ĉiuj bibliotekoj. Oni memoru, ke Zamenhof komence ortografiis sian nomon Samenhof kaj ke li uzis la pseŭdonimon D-ro Esperanto.

Inkunablo 50: V.L. KRAVCOV: Vsjemirnoje djelo. /Internacia entrepreno./ Bogučar?/ 1891. 46 p. (?) (Bibliografio..., p. 23; ne en BIL nek en DAVIDOV.)

Ĉiuj ceteraj detaloj mankas. Rusaj esperantistoj devus aktivigi por elfosi ĉi relikvon.

Inkunablo 65: L.L. ZAMENHOF: Novaj esperantistoj. Serio XIV. De 1./IV. 1893 ĝis 1./VII. 1893. Nürnberg: Tümmel 1893. 8 p. (Bibliografio..., p. 27; BIL 5287; DAVIDOV, p. 109.)

En germanaj bibliotekoj ĝi nenie troviĝas, sed restas la espero, ke oni trovos ĝin aliloke, ĉar sendube ĝi ekzistis.

Inkunablo 102: Aleksandro ZAKRJEVSKI: Regularo por la komencantaj fotografistoj. Loko? 1896. paĝo-nombro? (Bibliografio..., p. 37; BIL 5023; DAVIDOV ne konas ĝin.)

Stojan atribuas ĝin al Adam Zakrzewski, sed ŝajne temas pri du malsamaj aŭtoroj. Ĉiu-kaze, precipe polaj kaj rusaj esperantistoj devus esplori por eltrovi ĉi verketon.

◇ ◇ ◇ ◇ ◇

El la serĉataj unuaj eldonoj restas nur du fantomajoj, ĉar la numerojn

68 kaj 110 ni elspuris en IEMW.

Inkunablo 52: L.L. Zamenhof: The universal language Esperanto. Complete instruction book with two vocabularies, translated after the Russian of Dr. L. Samenhof by R.H. Geoghegan. Nürnberg: Tümmel 1892. 76 p. (Bibliografio..., p. 24; BIL 1859.)

DAVIDOV ne konas ĝin, sed tamen la eldonon de 1898. En germanaj bibliotekoj ĝi ne troviĝas. Nek NUC (National Union Catalogue, registranta la posedaĵojn de la usonaj bibliotekoj, ĉ. 500 volumoj) konas ĝin. Estus utile plu sisteme traserĉi anglajn kaj usonajn bibliotekojn sub la nomoj de Samenhof/Zamenhof kaj/aŭ Geoghegan.

Inkunablo 53: L. de BEAUFONT: Manuel complet de la langue internationale Esperanto avec double vocabulaire. Epernay 1892. 155 p. (Bibliografio..., p. 24; BIL 2084.)

Laŭ BIL ĝi aperis en Epernay, sed presiĝis ĉe Tümmel en Nürnberg. DAVIDOV (p.4) parolas eĉ pri du eldonoj sam-jaraj. Necesus sisteme traesplori precipe ĉiujn francajn bibliotekojn kaj arkivojn.

Jen la listo. La regulaj kunlaborantoj de Itô Kanzi faris sian eblon. Nun la tuta kapabla esperantistaro devus peni por trovi ĉi lastajn inkunablojn, eĉ se la komuna forto-streĉo vanus kaj restus senrezulta. Tiam, kaj nur tiam, ĉi inkunabloj niaj efektive apartenos definitive al la regno de la fantomoj.

Uzitaj mallongigoj:

Bibliografio... = Bibliografio de Esperanto. Parto unua. Libroj verkita en Esperanto aŭ pri Esperanto. Vol. unua. Bibliografiaj notetoj pri libroj publikigitaj de 1887 ĝis 1903. Paris: Esperantista Centra Oficejo 1912. IX, 106 p. (Esperantista dokumentaro. 17.)

BIL = P.E. Stojan: Bibliografio de Internacia Lingvo. Hildesheim, New York: Olms 1973. 560 p. (Repr. de la eld. Geneve 1929.)

DAVIDOV = Bibliografio. 1. Katalogo de la biblioteko (1888-1911) de Georgo Davidov. Wolfenbüttel: Heckner 1911. VIII, 129 p..

La aŭtoro volonte ricevos informojn pri la menciitaj inkunabloj. Lia adreso: R. Hauptenthal, Schulstr. 30, D-66133 Saarbrücken. Tel. 0681-811653; fakso: 0681-816713.

Mia kateto

de JI YINGENG

EN nia hejmo estas ore flava persa kateto. Ĝin ni rigardas ne kiel kate-ton, sed kiel knabeton, ne kiel besteton, sed kiel hometon, kiel membron de la familio.

Kiam ni eliras el la hejmo, ĝi sekvas nin per



la okuloj kaj ni diras al ĝi: “Ĝis revido!” Kiam ni revenas hejmen, ĝi tuj alkuras al ni kaj eĉ ĝoje grimpas sur nian korpon kaj ni ektenas ĝin

en la manoj kaj diras al ĝi: “Saluton!” Kiam ni estas sendormaj dum nokto, ĝi akompanas nin kuŝante ĉe niaj piedoj. Kiam ĝi bone manĝas, ni tre ĝojas. Kiam ĝi ne volas manĝi, ni mal-trankviliĝas. Kiam ni vidas ĝin, ni volas ekteni ĝin en la manoj. Kiam ni ne vidas ĝin, ni sopiras pri ĝi kaj tuj ĝin ekserĉas.

Iu-vespere, antaŭ ol rigardi televidon, mi ne vidis la kateton kaj vokis ĝin dufoje, ĝi tuj alkuregis al mi el la kuirejo kaj miaŭis al mi dufoje. Ŝajnis, ke ĝi diris al mi: “Ĉu vi vokas min? Mi kaptis muson en la kuirejo. Kion vi volas?” Post kiam mi rigardis televidon, mi ne vidis la kateton. Mi tuj ĝin ekserĉadis kaj trovis ke ĝi dormas, kuŝante arkoforme sur kesto, kun malantaŭa kruro ekster ĝia rando. Mi frapetis la kateton sur ĝia kruro. Ĝi tremetis kaj fiksrigardis min por momento. Ŝajnis, ke ĝi riproĉis min: “Mi dormas. Kial vi timigis min?”

La kateto kaptas por ni musojn. Ĝia vido estas akra kaj movo rapida. Ĝi neniam maltra-fas sian celon. Ĝi tre ŝatas purecon. Ĝi neniam fekas kaj pisas kie ajn. Ĉiufoje, post kiam ĝi finmanĝas, ĝi tuj eklekas sian buŝon per la lango kaj frotas la vizaĝon per antaŭa piedo lekita de la lango. Ĝi estas tre inteligenta. Ĝi scias, ke ni ĝin bone traktas. Ĝi neniam iras eksteren. Ĝi bone ludas kun ni. Ĝi alportas al ni ĝojon. Ni ĝin tre ŝatas kaj volonte servas al ĝi. Ĉiutage ni aĉetas kaj kuiras por ĝi kokajn kapojn kaj hepatojn, kiujn ĝi ŝatas. Mia edzino diris: “Ni ne malsatigus ĝin, eĉ se ni mem havus nenion por manĝi.”

Unuvorte, ni ne povas vivi sen ĝi. Ĝi jam estas nedisigebla membro de nia familio. ■

(Daŭrigo de p. 5)

komercajn bankojn kiel la ĉe-fajn, kun samtempa ekzistado de multspecaj financaj establoj, viza-ĝas al la mondo kaj malfermiĝas al la eksteraj landoj. Ĝia funkcia-do iom post iom konektiĝas kun internaciaj konvencioj. Malgraŭ

iuaj mankoj en la kreskado, unua-paŝe formiĝis financa framo bazi-ta sur leĝoj. Ni povas aserti, ke dank’ al praktikado de la ĉina monopolitiko kaj la kontrolado fare de la centra banko, la ĉina ekonomio stabile disvolviĝos plue, la komercaj bankoj des pli rapide merkatigis kaj juste kaj laŭorde kondukos al si konkuradon. Unu

el la celoj de la ĉina financa refor-mado estas fari fakajn bankojn veraj komercaj bankoj. Por turni ilin en komercajn bankojn kun in-ternacia nivelo antaŭ la fino de la 20-a jarcento ni havas ankaŭ la taskon de reformado kaj transfor-mado. Por atingi tiun ĉi celon es-tas pli grave kulturaj nombro da altkvalitaj financaj kapabluloj. ■

Aktivulo de Esperantujo

— Pri E-profesoro Danko

de SUN AIJUN



S-ro Danko

Foto de SUN AIJUN

FINE de la 20-aj jaroj komenciĝis E-movado en Wuhan, la ĉefurbo de Hubei-provinco, en la meza baseno de Yangzi-rivero. En la pasintaj dekoj da jaroj la Wuhan-a E-movado marŝis ĉiam en la antaŭa vico de la ĉina E-movado. La Hubei-a E-Asocio fondita en 1979 estas la unua provinca nivela E-asocio de Ĉinio. Estas menciinde, ke la Hubei-a E-movado neniam ĉesis en la pasintaj 40 jaroj kaj kuraĝigis aron da esperantistoj de Ĉinio. En Hubei aktivadas multaj esperantistoj, el kiuj unu estas s-ro Danko (Zhang Danchen), E-profesoro de la Centra-Ĉinia Normala Universitato kaj fondinto de la Hubei-a E-Asocio.

EN ESPERANTUJO

En 1935 s-ro Danko naskiĝis en Changsha, Hunan-provinco. En 1950 li forlasis la lernejon pro grava ftizo kaj kuŝis en la lito dum 4 jaroj. En tiu tempo li lernis la rusan lingvon pere de radio kaj metis por si bonan fremdlingvan bazon. En 1955 li transloĝiĝis en Wuhan. Per la unua loko en la ruslingva ekzameno li eniris en la fremdlingvan fakultaton de la Centra-Ĉinia Normala Universitato kaj eklaboris kiel ĝia instruisto.

En kurso por junaj instruistoj veterana esperantisto s-ro Xue Chengzhi (Ŝjue Ĉengĝi), estro de la fremdlingva fakultato, diris: “La lingvoj angla, rusa k.a. havas multajn esceptojn en gramatiko, sed ekzistas iu lingvo tute logika kaj senescepta. Tio multe faciligas lernadon.” S-ro Danko eklernis la lingvon Esperanto post la kurso. Li absorbiĝis en lernado de Esperanto, leginte la libron “Ses E-kursoj” verkitan de s-ro Tikos kaj la artikolon “Vizito en Kopenhago” skribitan de s-ro Chen Yuan (Ĉen Jūan) por la gazeto “Mondaj Scioj”.

Bone posedante la anglan kaj rusan lingvojn, li finlernis la libron “Elementa Kurso de Esperanto”, kompilitan de s-ro Venlo Fon, kaj trovis, ke la Esperantaj lernolibroj, kiujn li havis, ne sufiĉas por li. Li do skribis al s-ro Venlo Fon en Pekino kaj petis lian helpon. S-ro Venlo Fon respondis liajn demandojn en sia longa letero, konigis al li kiel altigi la lingvan nivelon per korespondo kun alilandaj esperantistoj kaj sendis al li katalogon de Esperantaj libroj kaj kelkajn ekzemplerojn de “El Popola Ĉinio”. Poste, dank’ al la Ĉina E-Ligo, li konatiĝis kun s-ro Hu Xifei, veterana esperantisto de la Hubei-a Medicina Instituto. Modesta kaj afabla, s-ro Hu instruis al li kiel lerni Esperanton kaj ĝustigis al li prononcadon.

Menciante veteranajn esperantistojn, pli-ol-60-jara prof. Danko diris kun emocio: “Dank’ al ilia



S-ro Danko (maldekstre) kaj liaj lernantoj

afableco, helpemo kaj sindonemo, mi dediĉas min al Esperanto.”

AKTIVULO DE E-MOVADO

“Dank’ al propagando kaj disvastigo, Esperanto povas ekzisti kaj progresi.”

La vortoj de s-ro Hu iluminis Dankon. Li aktive kontaktiĝis kun esperantistoj ĉinaj kaj alilandaj, disponigis Esperantajn materialojn en- kaj eksterlandajn en la legoĉambro de la universitato, konigis Esperanton sur murgazeto en ĝi kaj kontribuis per artikoloj por la E-rubriko de la bildgazeto “Bulgario”. Poste, li kunlaboris kun multaj esperantistoj. En 1962 li iniciatis la fondiĝon de

E-grupo de Wuhan.

En 1963 la E-grupo funkciigis E-kurson kaj elkulturis nombron da aktivuloj. Julie de tiu jaro, la Ministerio de Altlerneja Eduko de Ĉinio decidis funkciigi fakultativan E-kurson en 13 altlernejoj de la lando. La Centra-Ĉinia Normala Universitato estis unu el la unuaj altlernejoj, kiuj aranĝis E-kurson. Estis s-ro Danko, kiu gvidis ĝin. En la sinsekvaj 2 jaroj li dediĉis sian energion al la Wuhan-a E-movado. En 1964 pro troa laco la 29-jara Danko estis denove atakita de la serioza malsano. Je mencio pri la pasintaĵo, lia edzino Mo Shulan diris kun timo: “Tiam li plenuŝe sputis sango, kaj ni ĉiuj opiniis, ke li ne vivos longan tempon. Sed li venkis

la Morton.” Rigardante sian edzinon kun profunda amo, Danko diris: “Mi ŝuldas mian dankon al ŝia flegado en tiu periodo. Bone sciante, ke mi grave malsanas, ŝi edziniĝis al mi kaj subtenis mian aferon. Miaj sano kaj sukceso estas nedisigblaj de ŝia sindonemo.”


Sin elturninte el la morto por la 2-a fojo, Danko pli profunde komprenis la signifon de la vivo kaj refoje ĵetis sin en la E-movadon.

En 1966 komenciĝis la granda kultura revolucio kaj la E-movado interrompiĝis. Firme kredante, ke la E-movado estas justa afero, Danko kaj aliaj aktivuloj de la Wuhan-a E-grupo eldonis la bultenon “Ĉina Esperanto-movado” kaj distribuis

S-ro Danko (dekstre) kaj membroj de E-grupo de la Komisiono de la Eŭropa Komunumo kaj ĝia Centra Oficejo



S-ro Danko preleganta en la 28-a ILEI-Konferenco



ĝin en diversaj lokoj de Ĉinio, dank' al la subteno de s-ro Tikos, iniciatinto de la Wuhan-a E-movado en Hubei. Ili ankaŭ kunvenis okaze de la datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. En 1979 revigliĝis la ĉina E-movado kaj naskiĝis la Hubei-a E-Asocio kun la Wuhan-a E-grupo kiel la kerno.

En la fondkunveno de la Hubei-a E-Asocio, prezidata de s-ro Danko, la reprezentantoj el Hunan, Henan kaj aliaj provincoj esprimis, ke ili sekvos Hubei.

E-PROFESORO

Danko laboris kiel profesoro en la Centra-Ĉinia Normala Universitato. En 1980 li komencis instrui Esperanton kiel profesia E-profesoro. Estis la unua fojo siatempe en Ĉinio, ke Esperanto estis instruata kiel sendependa fako en altlernejo. "Esperanto-movado ne povas ekzisti sen esperantistoj. La instruado de la lingvo estas esenca antaŭkondiĉo de floranta Esperanto-movado," diris s-ro Humphrey Tonkin, iama prezidanto de UEA. La vortoj ĉiam kuraĝigas s-ron Danko al instruado de Esperanto.

En 1984 li estis komisiita kiel delegito de la ĉina filio de la Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj (ILEI). En 1988 li partoprenis en la 22-a Konferenco de E-istaj Instruistoj kaj la 73-a UK laŭ invito de ILEI kaj UEA. Kiel ĉefdelegito de la konferenco, s-ro Danko estis varme bonvenigata. Oni elektis lin kiel estraranon de ILEI kaj li estis taskita respondeci pri la filioj de diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko kaj ties disvolvigo.

En la konferenco Danko kaj diverslandaj reprezentantoj interŝanĝis instruajn spertojn kaj disku-

tis pri didaktiko oportuna al ĉinaj lernantoj, t.e., kombini lernadon de sistemaj scioj kun trejnado de la kapablo uzi la lingvon. En UK okazinta post la konferenco li faris prelegon kun la titolo "La historio kaj nuna stato de Esperanta instruado en ĉinaj altlernejoj" kaj estis aplaŭdata de la partoprenantoj.


Reveninte al Ĉinio, s-ro Danko uzis sciencajn instruajn spertojn en la Esperanta instruado kaj disvastigis en ĝi la nivelan ekzamenon de Esperanto. Li gvidis tian ekzamenon en Seulo de Koreio kaj en Nanning, Kantono, Hefei, Tangshan, Qingdao kaj Chengde de Ĉinio. Laŭ li, nun oni ne devas tro taksii instruadon de Esperanto. La kriterio de sukceso en la instruado signifas, ke 10 el la 100 lernantoj persistas en la lernado kaj 2 el ili aliĝas al E-movado. S-ro Danko instruis Esperanton al pli ol mil lernantoj. Kvankam ne ĉiuj el ili esperantistiĝis, tamen ili portas la kredon al la alta idealo de Esperanto en sia memoro.

POST EMERITIĜO

En 1995 prof. Danko emeritiĝis. Kvankam li ne plu okupiĝas pri Esperanta instruado, tamen li ankoraŭ multe kontribuas por E-movado. Kiel prezidanto de la Hubei-a E-Asocio, li senĉese resumas spertojn de la E-movado kaj gvidas la lokajn Esperantajn aktivadojn; kiel spertulo, li daŭrigas Esperantan tradukadon kaj verkadon. Lia edzino diris: "Post emeritiĝo li estas pli okupata, ol iam antaŭe. Esperanto estas esenca parto de lia vivo."

Fine, prof. Danko informis al mi, ke la Hubei-a E-Asocio havigis al si domon ĉe la pitoreska Donghu-lago de Wuhan. En marto 1996 oni starigos tie E-stacion, E-bibliotekon kaj gastejon el 2 ĉambroj por akcepti ĉinajn kaj alilandajn esperantistojn. ■

S-ro Danko (la tria de dekstre) kaj belgaj esperantistoj



Paco, eterna temo de esperantistoj

— Pri la 3-a Ĉina Kongreso de Esperanto

Teksto kaj fotoj de WANG SHIRONG

LA 29-an kaj 30-an de septembro 1995, la 3-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazis en Chongqing (Ĉongĉing), granda urbo en la sudokcidento de Ĉinio. La kongreson ĉeestis 270 esperantistoj el 26 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj de la lando.

Oni facile motivis la elekton de la kongresurbo Chongqing. Antaŭ pli ol 50 jaroj la ĉina popolo estis faranta malfacilan militon kontraŭ la japana imperiismo, kaj Chongqing fariĝis tiutempe provizora ĉefurbo kaj postfronto de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio. Tiam en Chongqing kolektiĝis multe da progresemaj esperantistoj, kiuj prenis Esperanton kiel armilon kaj malkaŝis al la mondo la krimojn de la japanaj agresantoj por gajni subtenon kaj simpatian de la popoloj de diversaj landoj. Hodiaŭ, kiam la ĉina popolo estis solenanta la 50-an datrevenon de la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la tuta mondo estis solenanta la 50-an datrevenon de la venko de la kontraŭfaŝisma milito, la ĉinaj esperantistoj okazigis sian trian tutlandan kongreson en Chongqing, centro de la ĉina E-movado antaŭ 50 jaroj. Tio havis eksterordinaran profundan signifon.

Je la 9-a matene de la 29-a de septembro, s-ino Li Yuping, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), deklaris komencita la 3-an Ĉinan Kongreson de Esperanto. La kongresanoj stariĝis kaj kantis la himnon “La Espero”. Post tio, 60 geknaboj suriris la podion kaj deklamis Esperantajn versojn por saluti la kongreson.

S-ro Chen Yuan, prezidanto de ĈEL, faris inaŭguran parolon. Li diris, ke antaŭ 60 jaroj progresemaj esperantistoj de Ĉinio prezentis la sloganon “per Esperanto por la liberigo de Ĉinio”. La slogano unuigis la ĉinajn esperantistojn en la batalo por liberigo de Ĉinio kaj starigo de prospera kaj potenca nova Ĉinio. Multaj esperantistoj oferis sian vivon por tiu celo. “Esperantistoj estas pacamaj, ili batalas por la paco, por la evoluo de la homa socio. Sen tiu celo Esperanto taŭgas por nenio. Tial ĉi-jare ni havas la kongresan temon ‘Esperanto kaj Paco’. Paco kaj evoluo estas la plej forta voko de la nuna epoko.”

S-ro Zou Guoxiang (Zou Ĝuoŝjang), ĝenerala sekretario de ĈEL, faris labor-raporton. En la raporto li resumis la laboron post la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en januaro 1992. Li diris: “En reformado de la ekonomia sistemo ĈEL kaj la lokaj Esperantaj

asocioj renkontis malfacilojn en la laboro, antaŭ ĉio en financo. Sed malgraŭ tio la ĉina E-movado akiris multajn sukcesojn. En la pasintaj 3 jaroj fondiĝis 5 fakaj E-asocioj, nemalmultaj lokaj asocioj okazigis fakajn kunsidojn, simpoziojn, E-kursojn, someran semajnon kaj jarkunvenon, kaj dank’ al tiuj agadoj multe vigliĝis la lokaj E-movadoj, kaj Esperanto estis multe disvastigita.”

S-ro Teng Jiuming (Teng Ĝiŭming), membro de la magistrato de Chongqing, kaj aliaj ŝtato-ficistoj de la urbo ĉeestis la inaŭguron kaj donis salutvortojn al la kongreso.

La kongreson ĉeestis ankaŭ s-ro Yosimi Umeda, prezidanto de la Internacia Kultura Laborejo de Japanio, kaj la de li estrata japana vizitgrupo, kaj koreaj samideanoj studentaj aŭ laborantaj en Ĉinio.


En la inaŭguro oni voĉlegis salutajn leterojn kaj telegramojn de lokaj E-asocioj kaj famuloj de Ĉinio, s-ro Lee Chongyeong, prezidanto de UEA, s-ro Yosikazu Takeuti, prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, kaj alilandaj E-organizoj.

La temo de la kongreso estis “Esperanto kaj Paco”. Samideanoj, 5 ĉinaj kaj 4 japanaj, faris prelegon. El diversaj flankoj ili ekspelikis la nedisigeblajn rilatojn de



La inaŭguro de la 3-a Ĉina Kongreso de Esperanto

S-ro Chen Yuan en la inaŭguro



aplikado, propagando kaj disvastiĝo de Esperanto kun defendo de la daŭra paco de la homaro.

Samideano Lei Junqi (Lej Ĝjunĉji) el Hebei-provinco prelegis sub la titolo "Esperanto rilatas intime al paco". Admirante Esperanton, li citis versaĵojn: "Pro via naskiĝo la mondo pleniĝas de amikeco, pro via naskiĝo la mondo pleniĝas de amo." Li substrekis: "Nun la mondo nombras dek milionojn da esperantistoj, kiuj estas neignorebla aktiva forto en la aferoj por defendi la pacon de la mondo."

S-ro Liu Fengyi, vicestro de la traduka sekcio de EPĈ, faris prelegon kun la titolo "Paco kaj evoluo estas nedisigeble ligitaj". Li diris, ke en la Dua Mondmilito, por la fina venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la ĉinaj esperantistoj kaj iuj alilandaj esperantistoj faris grandan kontribuon. Li menciis multe laŭdatajn nomojn: Ĵelezo, Zhang Qicheng (Ĝang Ĉjĉeng), Joĉaŝien, Jaziko, Sanio kaj Liu Ren de Ĉinio, Verda Majo de Japanio kaj Elpin de Koreio. En tre malfacila situacio ili eldonis la duonmonatan gazeton "Heroldo de Ĉinio", kiu distribuiĝis en 850 urboj de 63 landoj kaj regionoj. Verda Majo estis ĉefa kontribuanto de la gazeto. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito Ĵelezo, Venlo Fon, Honfan, Eltunko kaj aliaj funkciigis la Chongqing-an Korespondan Lernejon de Esperanto, en kiu lernis pli ol 3 000 personoj de 18 provincoj. Rememorante la fragmentojn el la ĉina E-movado, s-ro Liu Fengyi esprimis, ke li daŭrigos Esperantan laboron kun pli da fervoro kaj penos por plifirmigi la amikecon inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

S-ino Wang Lu de la Pekina Ĝenerala Petrolkemia Fabriko estas vigla juna esperantistino. Antaŭ kelke da jaroj ŝi gvidis plurajn E-kursojn por infanoj. En sia prelego ŝi diris: "La nuna paca vivo estas akirita per bataloj ankaŭ de la monda esperantistaro. Por de-

fendi la venkon kaj eviti militon, ni ĉiuj esperantistoj unuiĝu kaj batalu por defendi la mondpacon kaj renkonti la novan jarcenton."

Esperanto naskiĝis, ekzistas kaj evoluas por paco. Ĉiuj prelegantoj esprimis per la sama voĉo: "Pacon, sed ne militon."

Multaj prelegantoj menciis Verdan Majon. Tiu japana esperantistino estis legenda heroino en la okuloj de la ĉinaj esperantistoj. Kiam ŝiaj samlandanoj agesis Ĉinion instigate de militaristoj, ŝi senhezite staris ĉe justeco, batalis kune kun la ĉina popolo kontraŭ la agresantoj, kaj por tio ŝi dediĉis sian junecon.

Post la inaŭguro s-ro Yosimi Umeda kaj lia vizitgrupo, s-ro Liu Xing (Liŭ Ŝing), filo de Verda Majo, kaj aliaj kongresanoj kune venis al la iama loĝejo de Verda Majo. Kun plena respekto, ili pendigis sur la muro de la domo ŝtalan memortabulon prezentitan de japanaj esperantistoj. Sur la memortabulo estas teksto en la ĉina, Esperanta kaj japana lingvoj:

Honore al la senlaca ĉina-japana paro esperantista, Liu Ren (1909-47) kaj Hasegawa Teru (Verda Majo, 1912-47), kiuj loĝis tie ĉi en 1939 (de januaro ĝis aŭgusto) por aktivi en la batalado de ĉina popolo kontraŭ japana militarismo, dediĉas tiun ĉi memortabulon Internacia Kultura Laborejo de Japanio kaj la subtenantoj, kun forta deziro pri eterna amikeco inter japana kaj ĉina popoloj.

28 septembro 1995

Azio estas la plej granda kontinento, kie loĝas du trionoj de la homaro de la mondo, kaj la azia E-movado estas grava konsistiga parto de la mondo E-movado. Por plioftigi kontakton kaj kunlaboron de la aziaj esperantistoj kaj antaŭenpuŝi la azian E-movadon, ĉefaj respondeculoj de E-organizo de Ĉinio, Japanio kaj Koreio plurfoje interkonsiliĝis kaj faris decidon, ke la azia kongreso okazu en ĉiu tria jaro kaj la unua kongreso

okazu en Ŝanhajo de Ĉinio. Post la interkonsiliĝoj naskiĝis la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado kun s-ro Yosikazu Takeuti kiel prezidanto.

Profitante la okazon de la 3-a Ĉina Kongreso de Esperanto, s-ro Wei Yuanshu, ĉefa respondeculo de LKK de la 1-a Azia Kongreso kaj prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, konigis al la kongresanoj la preparadon de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto kaj la ĉefajn programojn de la kongreso. La kongresanoj estis multe kuraĝigitaj kaj ĝoje atendas renkontiĝon en Ŝanhajo en aŭgusto 1996.

Unu el la gravaj aferoj de la kongreso estis elekto de nova komitato de ĈEL kaj ĝia estraro. Post balotado s-ino Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭĝu), vicprezidanto de ĈEL kaj vicĉefredaktoro de EPĈ, fariĝis nova prezidanto de ĈEL kaj s-roj Chen Haosu, Liu Zhen (Liŭ Ĝen), Liu Junfang (Liŭ Ĝjunfang) kaj Zou Guoxiang ĝiaj vicprezidantoj (Zou Guoxiang kumulas la funkcion de la ĝenerala sekretario).

Por ke la kongresanoj povu ĝui la Tri Gorgojn de Yangzi-rivero, LKK prenis ŝipon kiel ejon por la fakaj kunsidoj kaj la fermo de la kongreso. Ĉe la fermo s-ino Tan Xiuzhu alte taksis la elstaran kontribuon de s-ro Chen Yuan por la ĉina E-movado kaj esprimis al li altan respekton. Ŝi esperis, ke la ĉinaj esperantistoj kiel eble plej rapide sin akomodos al la novaj ŝanĝiĝoj, unuiĝos en la nova situacio, heredos la gloran tradicion de la maljunaj esperantistoj kaj klopodos por reaperigi la pompon de la ĉina E-movado.

La kongresanoj konfirmis la laboron de ĈEL kaj prezentis utilajn konsilojn kaj sincerajn kritikojn. La ĉinaj esperantistoj esperas, ke la membroj de la ligo kaj la nova estraro kune penos en la nova situacio, venkos malfacilojn kaj kondukos la ĉinan E-movadon al nova stadio de disvolviĝo. ■



Ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kun la memortabulo antaŭ la iama loĝejo de Verda Majo

S-ro Chen Yuan kaj s-ino Tan Xiuzhu prezentas la novan libron "Verkoj de Jelezo".



Ĉe la stando de Esperantaj libroj

Ĉina urbeto, loĝkvartalo kun industriaj kaj komercaj aktivadoj kiel la ĉefaj, estas preskaŭ plej malgranda administra unito. Tial en ĝi oni povas ĝui la vivon kaj morojn de ordinaraj ĉinoj. En Ĉinio estas sennombraj urbetoj, kiuj ĉiuj posedas sian propran aspekton. En tiu ĉi rubriko ni konigos al niaj legantoj ĉinajn urbetojn plej tipajn.

La Red.

Incensfumo kaj kuirfumo

Teksto kaj fotoj de PANG NAIYING

EL temploj proksimaj kaj malproksimaj ŝvebis maldensa incensfumo kaj aŭdiĝis recitado de sutro kaj sonado de lignaj fiŝoj. La vendotabloj de butikoj, starantaj unuj apud aliaj ambaŭflanke de la strato, estis plenaj de incensoj, incensujoj, bildoj de Budho, rozarioj k.a. Aro post aro da pilgrimantoj kun incensoj kaj monaĥoj en kasajo iris sur monton. Agrabla sono ŝvebis ĉe la oreloj. Ĉu estis ludata budhisma muziko? Al tio mi ne donis atenton, ĉar mi ne komprenis ĝin, sed tio kvietigis min. Mi sciis, ke la alta ŝtona pordego malantaŭ mi apartigis la budhisman regnon Jiuhua(Ĝiŭhŭa)-monto disde la ekstera mondo.

La urbeto Jiuhua, kie mi estis, situas en la monto Jiuhua en la sudorienta parto de Anhui-provinco. Mi ne konis la rilaton inter la urbeto kaj la monto, kaj lokanoj ridis: “Povas esti, ke la monto estas kvazaŭ granda budho kun elstara ventro kaj la urbeto estas ĝia umbiliko.” La butikoj ambaŭflanke de Jiuhua-strato devus esti rozario ĉirkaŭ la kolo de la granda budho.

“Morgaŭ pluvos,” diris urbetanoj, “ĉiujare, en la naskiĝtago de Ksitigarbha, pluvas por lavi la teron kaj budhajn pagodojn.” Sciante nenion pri Ksitigarbha, mi konsultis iun monaĥon.

Li diris al mi: “La ĉina budhismo havas 4 bodisatvojn: Ksitigarbha de la monto Jiuhua, Avalokitesvaro de la monto Putuo, Manjusri de la monto Wutai kaj Samantabhadra de la monto Emei. Oni devas studi budhismon ekde Ksitigarbha. Ĉar la tero kun abundaj riĉfontoj estas la bazo de nia vivo kaj budhismo prenas ĝin kiel la animan trezoron de la homo, t.e., saĝecon, moralon kaj talenton. Budho diris, ke la anima trezoro de ni ĉiuj estas sama, kiel la lia. Sed ni ne scias kiel ekspluati ĝin. Kaj Ksitigarbha estas bodisatvo, kiu instruas al ni ekspluati la animan trezoron...”

Lia parolo kvazaŭ iluminis min. “Do, ĉu vere ekzistis Ksitigarbha?”

Li kapjesis, dirante: “La budhisma iniciatinto de la monto Jiuhua estis korea monaĥo. 1 300 jarojn antaŭe, li naskiĝis en reĝa familio de Koreio. En la aĝo de 24 jaroj li venis en la monton Jiuhua por memkulturado kaj forpasis en la aĝo de 99 jaroj. Dum 3 jaroj lia kadavro ne putriĝis. Kiam oni skuis ĝin, la artikoj eksonis. Tio atestis la notojn pri Ksitigarbha en la budhismaj sutroj, tial la monaĥoj kultis lin kiel bodisatvon, konstruis stupaon por li kaj, pli poste, grandiozan palacon por li. Ekde tiam la monto Jiuhua fariĝis ritejo por Ksitigarbha. Nuntempe sur la monto estas 800 monaĥoj, 80 temploj kaj sennombraj monaĥoj.”

En la sekvanta tago, kiam mi partoprenis la ceremonion por inaŭgurado de la stupao por Ksitigarbha, vere pluvis, sed la kandeloj kaj incensoj ankoraŭ brulis sur la placo.

Iu montano vendis pluvombrelojn kaj mi aĉetis unu el oleita papero, kiu jam malaperis antaŭ longe en la urboj. Sur ĝi estis belaj pentraĵoj de lotusfloroj kaj birdoj. Mi dankis la montanon, sed li diris: “Danku bodisatvon Ksitigarbha. Nia komerco floras ĉiujare en tiu sezono. Budho postulas fari pli da bonoj, kaj mi vendas ombrelojn je modera prezo.”

Estis agrable marŝi kun ombrelo en pluvo. Je la momento kelkaj pilgrimantoj kaj monaĥoj kolektiĝis sub tendo ĉe ĉielskrapantaj maljunaj arboj kaj ekmanĝis ĉe 2 kvadrataj tabloj, sidante sur benketoj.

“Oh, bonvenon al vi!”

“Oh, dankon!”

En dialekto la mastrino senĉese salutis siajn klientojn kaj proponis al ili varmajn pladojn...

Tio okazis en gastejo en antikva gusto kaj en strukturo de tradicia loĝdomo de suda Anhui-provinco. Ĝi distingiĝas per blankaj muroj, bluaj tegoloj kaj skulptitaj pordo kaj fenestroj. En la ĉambroj estis bambuaj litoj kaj seĝoj. La mastrino diris al mi, ke depost la malfermiĝo de la monto Jiuhua en la komenco de la 80-aj jaroj, multiĝis pilgriman-

toj kaj turistoj. Tial ŝi ekfunkciigis tiun ĉi gastejon. Laciĝinte, oni povas trinki teon aŭ tranokti en ĝi. Preskaŭ ĉiuj familioj loĝantaj ĉe Jihua-strato entreprenas tian turisman servon. Dank' al prospero de la komerco kaj pliigo de enspezo, oni konstruis 1-2 etaĝdomojn kaj aĉetis aŭtomobilon por veturigi turistojn.

En la urbeto Jihua vivas pli ol 1 600 loĝantoj, sed ne ĉiuj familioj prosperas en komerco. Pri vojo mi demandis montanon vektportantan lokajn produktojn en pluvo. Li akompanis min ĝis la gastejo, en kiu mi devis tranokti. Atinginte la lokon, li elprenis 2 paketojn da sekigitaj giromitroj kaj bambuŝosoj kaj diris al mi: "Bonvolu aĉeti, hodiaŭ mi nenion vendis." Mi neniel povis rifuzi lin. Li havas iom pli ol 20 jarojn, sed sur lia vizaĝo jam aperis profundaj faltoj. Loĝante ĉe la monto kaj ne havante la eblon funkciigi gastejon aŭ butikon, li povis fari nenion alian krom kulturi teon aŭ kolekti montajn produktaĵojn por vendi. Li iris en pluvo dum la tuta tago kaj manĝis nur malvarmajn farunaĵojn tagmeze.

Ankaŭ tiuj, kiuj rapide marŝis portante palancon sur kruta montvojo, vivis malfacilan vivon. Sen klientoj ili ripozis apudvoje.

"Ĉu vi estas laca?"

"Kial ne? Mi grimpas portante klienton..."

"Pro kio vi ne entreprenas ion alian?"

"Mi lernis nur unu jaron kaj ne estas klera."

La 30-jara Li Songhua ekokupiĝis per portado de palankeno en la aĝo de 19 jaroj kaj nuntempe li vivtenas per tiu laboro la 5-membran familion. Li portis turistojn el multaj landoj. Nun li faras ĉion Palankenisto Li Songhua atendanta klienton



eblan por gajni monon, por ke lia filo lernu estonte en alia loko.

La monaĥoj ofte aĉetis ĉe montanoj vivbezonaĵojn. En foiro multaj pilgrimantoj kaj monaĥoj manĝis en temploj. Tiam montanoj estis petitaj prepari manĝaĵojn en temploj. Kiam montanoj malsaniĝis, ili konsultis monaĥojn, kiuj scipovis kuraci malsanojn. Kompreneble, la monaĥoj ne postulis monon. Por danki ilin la montanoj bruligis incenson por bodisatvo aŭ donis legomojn al ili. Tiamaniere la monaĥoj kaj loĝantoj en la monto Jihua harmonie vivas generacio post generacio, kaj formiĝis la originalaj moroj religiaj kaj laikaj de la urbeto. En la 8-a de la 12-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro, la tago de budhiĝo de Ŝakjamunio, la monaĥoj preparis en temploj kaĉon el ruĝaj jujuboj, giromitroj, rizo kaj fazeoloj por regali montanojn. Antaŭvespere de la Nova Jaro, post manĝado de viando, la montanoj purigis la servicon, preparis vegetarajn pladojn kaj festis la Novan Jaron por Budho.

La budhistoj ne mortigas vivantojn kaj la montanoj estas kompreneble protektantoj de animaloj. Ĉiam, kiam neĝego blokadis la monton, malsataj simioj eniris en domojn de montanoj por serĉi manĝaĵojn. Tiam la mastroj regalis ilin per bongustaj manĝaĵoj.

Dum kvietaj noktoj aŭdiĝis en la urbeto sonorado el antikvaj temploj en la malproksima monto. Por kiel eble plej baldaŭ descendi de la monto, iom post la 4-a de la frua mateno mi jam iris sur Jihua-strato. Junaj kuiristoj estis preparantaj ĝjaŭzi-ojn kaj aliajn farunaĵojn sub la lampo en la restoracio kaj kuirfumo ŝvebis sub la tegmentrando. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

*Privataj entreprenistoj serĉas perantojn, kiuj bone parolas la hungaran aŭ slovakon lingvon. Adreso: Amika Rondo de E-istoj, ZS. Viszlay, 044 05 Janik 5, Slovakio.

*Nova adreso de "Helianto", informilo de Ukraina Esperanto-Asocio, estas: p.k. 26, Luck-18, 263018 Ukrainio. Abono: 5,00 USD al UEA-kodo nivo-p; 10 IRK; vialandaj poŝtmarkoj je la sama valoro; interŝanĝe abono de alia periodaĵo. Senpagan provnumeron oni ricevos kontraŭ simpla peto.

*Muzeo de Eroŝenko, kiu fondiĝis antaŭ 5 jaroj, kolektas materialojn pri Eroŝenko. Adr.: 309530 Obuhovka, District of Stary Oskol, Belgorod Region, Russia.



Jiuhua-monto

Foto de FANG LIANGGEN

Turisto ĉe telefon-kiosko en la urbeto





Turistoj en pluva tago



Incensado



La mondo pri loĝantaro

LA mondo iris longan vojon en la kono pri la loĝantaro. Nur en septembro de 1994, kiam okazis la Monda Loĝantara kaj Disvolva Konferenco de UN en Kairo, la mondo atingis komunan konon pri la loĝantara problemo. Nun la ĉefa problemo estas, ke oni agas ne unuanime kaj multaj aktualaj problemoj ne solviĝis. La loĝantaro daŭre rapide kreskas kaj diversaj kontraŭdiroj pli kaj pli akriĝas.

En 1974 la Unua Monda Loĝantara kaj Disvolva Konferenco okazis en Bukareŝto, ĉefurbo de Rumanio. En la konferenco okazis granda malakordo de la opinioj inter la landoj evoluantaj kaj evoluantaj. La evoluantaj landoj opiniis, ke la memvola malaltigo de naskokvanto por bredi loĝantaron kreskon estas facila kaj utila al la ekonomia disvolviĝo de la malriĉaj landoj. Sekve oni devas energie efektiviĝi naskolimigon. Sed la evoluantaj landoj prezentis la sloganon: "Disvolvo estas la plej efika preventilo." Oni devas unue disvolvi kaj poste redukti la loĝantaron.

En 1984 la Dua Monda Loĝantara kaj Disvolva Konferenco okazis en Meksiko. Multe suferinte de la rapida ŝveliĝo de la loĝantaro en la pasintaj dek jaroj, la evoluantaj landoj deziregis subtenon al la naskolimiga politiko. Tamen iuj evoluantaj landoj pledis, ke la evoluantaj landoj praktiku merkatan ekonomion, opiniante, ke se nur la ekonomio disvolviĝos, la naskokvanto nature malkreskos.

En la Kaira Konferenco la opinioj de ili ambaŭ tendencis al unueco kaj aprobis "Platformon de Agado". Post 20-jara ripetfoja debato ili fine atingis komunan konon pri la ŝlosila problemo. Oni povas diri, ke tio estas la plej grava sukceso de la Tria Monda Loĝantara kaj Disvolva Konferenco, malgraŭ ke ankoraŭ ekzistas malsamaj opinioj pri iuj aliaj gravaj problemoj.

Ankaŭ Ĉinio iris longan kaj zigzagan vojon por koni loĝantaro-limigon, tamen la mondo atingis la konon malpli frue ol Ĉinio je 20 jaroj. Ili atingis la komunan konon dank' al la jenaj profundaj ŝanĝiĝoj

en la lastaj jaroj:

Unue, la granda loĝantaro kaj ĝia rapida kresko kaŭzis serion da problemoj. En 1900 la mondo nombris 1.7 miliardojn da loĝantoj. Dum la 20 jaroj de la unua loĝantara konferenco en 1974 ĝis la tria la loĝantaro de la mondo kreskis je 1.7 miliardoj. Nun la totala nombro de loĝantoj de la mondo atingis 5.5 miliardojn, kies 77% vivas en la evoluantaj landoj. Tiel granda skalo kaj tiel rapida kresko de la loĝantaro alportis multe da seriozaj problemoj kaj al la evoluantaj landoj kaj al la evoluantaj. Ekz. por kontentigi sian riĉan vivon la evoluantaj landoj devis importi grandan kvanton da naturaj materialoj el la evoluantaj landoj, kaj iuj el ili ĉiujare importis tiom da petrolo, kiom duono de ilia totala konsumo de petrolo; se la loĝantaro de la evoluantaj landoj tiel rapide kreskas, se nur ĉiu loĝanto ricevas minimuman riĉfonton, do rapide malmultiĝas la eksporteblaj riĉfontoj kaj tio malhelpas la produkton kaj vivon de la evoluantaj landoj. Ni prenu alian ekzemplon. Tro rapida loĝantara kresko en la evoluantaj landoj kaŭzas migradon de loĝantoj. Usonanoj pere de ĵurnaloj vokis en la lastaj jaroj, ke estas necese redukti migrantojn de la nuna miliono al centmil, kaj komencis limigi la migradon en kuracado, assekuro, socia bonstatigo kaj aliaj flankoj. Se la loĝantara skalo kaj tro rapida loĝantara kresko ne estos bremsita, tio plagos kaj la evoluantajn landojn kaj la evoluantajn.

Due, influo de la homoj sur la fizika, kemia kaj biologia medio kaj delikateco de la homa reago al la media ŝanĝiĝo. Ekz. grunda erozio, dezertiĝo, arbara degenero, poluado de akvo, forceja efekto, acida pluvo, detruo de ozonotavolo kaj aliaj, kiuj ne konas landlimon, malutilas kaj al la evoluantaj landoj kaj al la evoluantaj. La evoluantaj landoj akuzas la evoluantajn pri ilia tro granda loĝantaro, postgintaj teknikoj kaj poluanta medio, dum la evoluantaj landoj akcentas sian rajton en la disvolvado kaj postulas, ke la evoluantaj landoj transigu al ili la avangardan mediprotektan teknikon. Iuj malproksimvidaj okcidentanoj trovis, ke la esenco de la

problemoj kuŝas en tro granda loĝantaro, se nur la loĝantaro-kresko estos bremsita, la ekonomio disvolviĝos, tiam protektado de ekologia ekvilibro de la mondo estos efektivebla.

Trie, ĉiam pligrandiĝas la diferenco inter la riĉuloj kaj malriĉuloj. Laŭ la statistiko de la Monda Banko, en 1992 la pokapa produktovalor de la civitanoj de la mondo estis 4 280 usonaj dolaroj, i.a. la 800 milionoj da riĉaj homoj enspezis po 22 000 usonajn dolarojn kaj 2.6 miliardoj da mezriĉaj homoj — ĉ. 1 600 usonajn dolarojn. 2 miliardoj da malriĉuloj enspezis po malpli ol 400 usonajn dolarojn. Ekde 1960 la diferenco inter malriĉuloj kaj riĉuloj ne nur ne malgrandiĝis, sed pligrandiĝis. La plej riĉaj homoj (5% de la monda loĝantaro) meze enspezis je 30 obloj pli multe ol la plej malriĉaj (5% de la monda loĝantaro) en 1960, je 32 obloj en 1970, je 45 obloj en 1980 kaj je 59 obloj en 1989. Kiel la mondo povos stabiligi, se la afero tiel daŭros?

La profundaj ŝanĝiĝoj de la supre menciitaj tri flankoj intime rilatas al tro rapida kresko de la loĝantaro. Tio prudentigis la malproksimvidajn personojn de ambaŭ flankoj, ke ili, formetante debaton flanken, kune penas por bridi troŝveligon de la loĝantaro. Jen vera motivo por aprobo de la "Platformo de Agado" kaj atingo de komuna kono en la konferenco de 1994.

Kiel efektiviĝi la platformon? Kiuj obstakloj ekzistas? Bonvolu legi jenajn konkludojn:

Unue, kiuj pagas por naskolimigo kaj aliaj elspezoj por loĝantara aktivado de la mondo? Kvankam la konferenco konsentis, ke en 2000 la agada financo plimultiĝos al 17 miliardoj da usonaj dolaroj kaj el ili 5.7 miliardojn liveros la riĉaj landoj, tamen, la restaj 11.3 miliardoj da usonaj dolaroj ankaŭ estas peza ŝarĝo por la evoluantaj landoj. 5.7 miliardoj da usonaj dolaroj estas ne granda sumo por la evoluantaj landoj, tamen oni dubas, ĉu ili volantas doni la monsumon. En la Monda Mediprotekta kaj Disvolvita Konferenco, okazinta en Rio-de-Ĵanejro en 1992, diversaj landoj promesis doni monhelpon, sed ĝis nun nur tre malgranda monsumo estis kolektita.

Due, kiu kaj kiel disponos pri tiu monsumo? Ĉu la monsumo estos disdonita al la registaroj de diversaj landoj aŭ la neregistaraj organizoj? Ĉu ĝi estos uzata por naskolimigo aŭ aliaj aferoj? Specialistoj antaŭdiris, ke 2/3 el la sumo uziĝos por naskolimigo kaj la resta 1/3 por la sano de la patrinoj. La dokumento de la Kaira Konferenco montris, ke la tradicia naskolimiga servo jam ne povas likvidi la latentan damaĝon kaŭzitan de la tro granda loĝantaro. Sano de la patrinoj aludas ne nur ilian korpon, sed ankaŭ ilian spiritan kaj socian staton. Oni timas, ke tiu limigita monsumo elspeziĝos por netaŭgaj aferoj.

Trie, konflikto inter la tradicia kulturo kaj kultura ŝanĝiĝo kaŭzita de la loĝantara problemoj. Ekz.

en iu evoluanta lando 5 koncernatoj de abortigo estis pafmortigitaj en la lastaj jaroj. La problemoj pri la politika kaj ekonomia pozicio kaj eduko de virinoj en iuj religiaj landoj malfacile solviĝos en la proksima estonteco.

Kvare, la kaira dokumento deklaris, ke ĉiu paro da geedzoj kaj individuoj devas havi rajton decidi nombron de siaj naskoj. Kion fari, se ilia decido ne konformas al la loĝantaro-limiga celo de ilia lando?

Kvine, kiel estigi ekvilibron inter la ekonomia disvolviĝo kaj tro rapida kresko de loĝantaro de la malriĉaj landoj unuflanke kaj la alta konsumo de la riĉaj landoj aliflanke? Meznombra konsumo de energio de unu persono en iu evoluanta lando egalas al tiu de 12 ĉinoj aŭ 422 egiptoj. Laŭ la konsumo de naturaj riĉfontoj, tia evoluanta lando ja povas esti kalkulata kiel lando kun tro granda loĝantaro.

La supre diritaj problemoj estas ŝlosilaj por efektivigi la Platformon de Agado de la Kaira Konferenco. Atingi la komunan konon estas nur la unua paŝo. La monda loĝantaro-limigo atribuos sian efektiviĝon al la kuna penado de ĉiuj malriĉuloj kaj riĉuloj, kiuj havas malsamajn kredojn, malsamkolorajn haŭtojn, malsamajn ŝtatanecojn kaj etnojn. Espereble, la Kvara Monda Loĝantara kaj Disvolvita Konferenco en 2004 havos pli grandan progreson. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1996

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totale
Aŭstralio	AUD	19.00	16.00	35.00
Aŭstrio	ATS	192.00	128.00	320.00
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Britio	GBP	10.00	6.00	16.00
Germanio	DEM	28.00	18.00	46.00
Finnlando	FIM	61.00	50.00	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Israelo	USD	14.00	12.00	26.00
Italio	ITL	20200.00	13800.00	34000.00
Japanio	JPY	1700.00	1300.00	3000.00
Kanado	CAD	17.00	15.00	32.00
Nederlando	NLG	28.00	23.00	51.00
Nov-Zelando	NZD	26.00	22.00	48.00
Svisio	CHF	23.00	17.00	40.00
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
TARIFO A	USD	14.00	12.00	26.00
TARIFO B	USD			15.00
TARIFO C	USD			10.00
TARIFO A: Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
TARIFO B: Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
TARIFO C: Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
Rim. Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10.00 usonajn dolarojn.				

Duan-festo de ŝuj-oj

Fotoj de WANG XINMIN kaj XU XIANGJUN

Ŝuj-oj, ĉinaj nacimalplimultanoj, loĝas ĉefe en la suda kaj sudorienta partoj de Guizhou-provinco sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenajo. Tie densas arbaroj kaj humidas klimato, kio estas tre utila al forstokulturo kaj agrikulturo. La ŝuj-oj, loĝantaj tie generacio post generacio, ne nur faris sian hejmlokon riĉa je fiŝoj kaj rizo, sed ankaŭ kreis sian brilan kulturon.

La plej solena festo de la ŝuj-oj nomiĝas Duan. Ĉiujare, post la aŭtuna rikolto, ĉiuj vilaĝanoj balaas sian korton kaj purigas sian domon. Antaŭvespere de la festo oni frapas kuprajn gongojn por adiaŭi la malnovan jaron kaj bonvenigi la novan. Ĉiuj familioj buĉas kokojn kaj anasojn, preparas tradician manĝaĵon fiŝo kun poreo ene por regali la gastojn.

En la festotago oni, portante nacian kostumon, vizitas parencojn kaj amikojn kaj esprimas bondezirojn unu al alia. Ŝuj-aj gejunuloj kolektiĝas en draŝejo, ludas blov-instrumenton *luŝeng-o*, kantas kaj dancas, faras ĉevalkonkurson, toreadon kaj aliajn tradiciajn aktivadojn. La spektaklo estas tre vigla.

Festeno





Duan-festo

Gaja danco



Frapo de tamburo por adiaŭi la malnovan jaron kaj bonvenigi la novan



Preparo de tradicia mangaĵo fiŝo kun poreo ene





HU YUN:

Turismo kaj feriado

Fiŝhokado

URBANOJ tre okupataj en labortempo sopiras pri ripoztagoj, en kiuj ili povas liberiĝi de la urba bruado kaj peza mastrumado — trovi kvietan lokon por ludi pilkon aŭ promenadi; naĝi en maro kaj kuŝi sur mola plaĝo ĝuante la sunon; kun familianoj remi aŭ fiŝhoki, enspiri freŝan aeron de kamparo, plene ĝui la familian feliĉon...

Celanta reordigi la animstaton kaj malstreĉi la korpon, la feriado tre plaĉas al multaj urbanoj kaj fariĝis nova tendenco de internacia turisma afero.

Nun en Ĉinio la tradicia turismo de simpla vizitado transformiĝas en kombinaĵon de vizitado kaj feriado. La ĉefa temo de la Ĉina Turisma Jaro 1996 estas: "Ĉinio en 1996 — Nova Feriejo".

En la pasintaj jaroj ĉinaj turismaj servoj prezentis programojn ĝui ĉinajn pejzaĝojn (1993), rigardi ĉinajn historiajn restaĵojn (1994) kaj koni morojn kaj kulturojn de ĉinaj nacioj (1995), kio helpis la perfektigon de la ĉina turisma merkato. Laŭ statistiko, en la unua duonjaro de 1995 venis al Ĉinio ĉ. 22 milionoj da turistoj, je 3.2% pli multe ol en la sama periodo de 1994. En 1994 la ĉina turisma servo enspezis 7 mi-

liardojn da usonaj dolaroj, kaj per tio ĝi leviĝis de la 41-a loko en 1978 al la 10-a en 1994 en la mondo.

Tamen la ĉefa temo de ĉina turismo estas vizitado, ĉar en Ĉinio estas mondfamaj vidindaĵoj, kiel la Granda Muro, la Imperiestra Palaco kaj la Terakota Legio el la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.). Ĉu Ĉinio taŭgas ankaŭ por feriado kaj ripozo? La programoj de la Ĉina Turisma Jaro 1996 respondos tiun demandon.

Turisma feriejo en Ĉinio aperis en 1992. La Ŝtata Konsilantaro projektis feriejojn en taŭgaj regionoj kaj post esploro permesis konstruon de 11 feriejoj. Nun tiuj 11 ŝtat-nivelaj kaj ĉ. 60 provinc-nivelaj feriejoj estas konstruataj kaj plejparto de ili estos lanĉitaj post unu aŭ du jaroj.

Inter tiuj feriejoj, Yalongwan havas geografian avantaĝon, ĉar ĝi situas en Sanya de Hainan, la plej suda provinco de Ĉinio. Sanya estas sunluma, aerofreŝa kaj ĉemara, kun 116 vidindaĵojn. Tie ne nur estas bela tropika marbordo, sed plie, oni konstruis la feriejon laŭ la internacia normo. Pro tio oni alte taksas Yalongwan, kiu fariĝos ĉina turisma reprezentanto en la internacia mer-

kato de turismo kaj feriado. La inaŭguro de la Ĉina Turisma Jaro 1996 okazos en Yalongwan, kio ĝojigas la Sanya-anojn kaj donas al ili ŝancon sin prezenti al la mondo.

En Ĉinio ankoraŭ ne ekzistas perfekta loko por feriado, tamen la hoteloj, vendejoj kaj restoracioj povas bone servi al la feriantoj. Ekz. la Pekina Hotelo kun ĉ. 100-jara historio havas 40 restoraciojn grandajn kaj malgrandajn, kie oni povas ĝui ne nur eŭropajn manĝaĵojn, sed ankaŭ diversajn ĉinajn manĝaĵojn kun lokaj gustoj.

Ankaŭ programoj en loka stilo plaĉas al la feriantoj. En antaŭurbo de Ŝanhajo estas Taoyuanvilaĝo, kiu ne havas vidindan pejzaĝon, tamen ebligas ĝui kamparan vivon. Oni povas loĝi ĉe vilaĝanoj, fari kamplaboron, mem prepari manĝaĵojn, kaj ankaŭ boati sur rivereto aŭ bicikli en la vilaĝo...

En la Ĉina Turisma Jaro 1996 estos ankaŭ aliaj programoj, kiel Biera Festivalo en Qingdao, Jakta Konkurso en Dalian, Fiŝhokado kaj Familia Feriado sur Taihu-lago, Golfludo en Guangxi, Surakvaj Sportoj en Fujian kaj Drakboata Konkurso en Hunan. ■

Antaŭparolo

En vespero antaŭ 1 800 jaroj, kiam la majesta roma imperiestro Cezaro aperis en teatro, lia silka robo ravis ĉiujn ĉeestantajn aristokratojn kaj altrangulojn. "Ho, kiel belega!" Tuj en la halo ektondris varma aplaŭdo.

La bela silkaĵo importiĝis el Ĉinio. En Ĉinio cirkulis mito: En la tempo, kiam morusarboj estis plenaj de junaj folioj, en la korto levigis ĉevala felo sunumata, kiu volvis sveltan knabinon. Ŝi ĵetis sin sur morusarbojn kaj transformiĝis en raŭpon kun ĉevala kapo kaj svelta korpo. La mito diras, ke jam en la antaŭhistoriaj jaroj ĉinoj komencis bredi silkraŭpojn. La grandnombraj elterigitaj objektoj atestis, ke antaŭ 4 000 jaroj ĉinoj jam scipovis fari silkajn fadenojn, rubandojn kaj satenon. Aprile de 1989 en la subtera palaco de Famen-templo de la urbo Xi'an (Ŝji'an), Ĉinio, estis trovitaj multspecaj belegaj silkaĵoj faritaj en Tang-dinastio (618-907). Ili montris la altan teknikon de silka produktado en la dinastio.

Antikvaj ĉinoj bredis silkraŭpojn, elbobenis kokonojn, teksis silkon kaj transportis ĝin al Centra Azio kaj Eŭropo. Tiel inter Ĉinio kaj la Romana Imperio aperis internacia vojo destinita ĉefe por silkaja komercado. En 1877 germana geografo W. Richthofen en sia verko "Ĉinio" donis al la vojo belan nomon Silka Vojo, kiu estis tuj akceptita de la publiko. Poste la Silka Vojo portis ankaŭ alian enhavon kaj ĝi fariĝis la vojo de ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj Okcidento.

De Ĉinio al Romio la Silka Vojo transpasis senliman dezerton kaj altajn montojn. En la antikveco ĝi ne estis unuopa vojo, sed voj-reto. Ĝi startis de la urbo Chang'an (la hodiaŭa Xi'an) kaj etendiĝis okcidenten, traŭtrante la provincojn Shaanxi (Senŝji), Ningxia (Ningŝja), Gansu, Qinghai (Ĉinghaj) kaj Xinjiang (Ŝingjang). De Xinjiang ĝi daŭre etendiĝis okcidenten, trapasis mez-aziajn landojn kaj fine atingis Konstantinopolon (la nuna Istanbul de Turkio). Ĝenerale dirite, la Silka Vojo dividiĝis ĉe Dunhuang, Gansu-provinco, en tri liniojn: la norda linio etendiĝis okcidenten laŭ la norda Tianshan-montaro en Xinjiang, la meza linio etendiĝis laŭ la norda ekstremo de la dezerto Taklimakan kaj la suda linio laŭ la suda ekstremo de Taklimakan. Ekster Ĉinio, la vojo trapasis la mez-aziajn landojn Afganio, Hindio, Pakistano, Irano, Irako, Sirio kaj Turkio.

En la ĉina historio la Silka Vojo estis nomata vojo al la Okcidento, kiu ampleksas la vastan regionon okcidente de Dunhuang, t.e., la regionon sude kaj norde de Tianshan-montaro kaj Mezan Azion. Pri tio la plej frua noto legiĝas en la "Ĉapitro pri Dawan en

Historia Kroniko", verkita de fama ĉina historiisto Sima Qian (Sima Ĉjan) laŭ rakonto de Zhang Qian, la unua persono, kiu vojaĝis al la Okcidento en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-23 p.K.). Kiel sendito de la dinastio, Zhang Qian dufoje vojaĝis al la Okcidento. Kvankam li ne plenumis sian taskon, tamen per siaj propraj travivaĵoj li riĉigis ne nur la sciojn de la ĉinoj pri la Okcidento, sed ankaŭ tiujn de la okcidentanoj pri Han-imperio. De tiam la senditoj kaj komercistoj senĉese iradis sur la Silka Vojo. Pro tio la vojaĝo de Zhang Qian estis rigardata kiel marko de malfermo de la Silka Vojo en la okuloj de ĉinaj kaj alilandaj fakuloj.

Post la vojaĝo de Zhang Qian la Silka Vojo spertis kelkfoje prosperiĝon kaj malprosperiĝon. Ĝi atingis kulminon de la disvolviĝo inter la sesa kaj deka jarcentoj, kiam regis en Ĉinio la dinastioj Sui kaj Tang. Tiam la registaroj starigis ĉe la vojo administracion por teni la vojon bone funkcianta. Krome, sur la vojo de Chang'an al la Okcidento estis multaj postiljonaj stacioj kaj depotejoj por faciligi al vojaĝantaj komercistoj noktadon kaj manĝadon kaj gardi ilin kontraŭ danĝero. Venis al Ĉinio per la vojo senditoj kaj komercistoj ankaŭ el arabaj landoj, Orienta Romio, Afriko kaj la Hinda Duoninsulo. Tiam sur la Silka Vojo regis plena vicleco.


Kiam ĉinaj silkaĵoj komencis eksportiĝi okcidenten? Iuj diras, ke tio okazis en la 3-a jc a.K., aliaj diras, ke tio okazis en la 4-a aŭ 5-a jc a.K. Tamen estas certe, ke tio okazis antaŭ la vojaĝo de Zhang Qian al la Okcidento, alivorte, antaŭ la 2-a jc a.K. Kiam la ĉina historio eniris en Tang-dinastion, la Silka Vojo jam spertis centojn da jaroj da disvolviĝo, kaj ne plu estis vojo sole por negoci per silkaĵoj. Pere de ĝi la teo, porcelanaĵoj, kvar grandaj inventoj (kompaso, papero, presarto kaj pulvo), konfuceanismo kaj taoisma filozofio de Ĉinio estis enkondukitaj en la Okcidenton, dum la lanaĵoj, koton, bonrasaj ĉevaloj, legomoj kaj fruktoj de Centra Azio kaj Eŭropo estis enkondukitaj en Ĉinion. Ankaŭ budhismo, kristanismo kaj islamismo disvolviĝis en la Oriento.

Ekde la 12-a jc, pro prosperiĝo de mara navigacio la tera Silka Vojo estis iom post iom anstataŭita de la mara Silka Vojo. Cirkulas ankaŭ diro pri stepa Silka Vojo, laŭ kiu la nordaj nacimultnombraj rajdis sur la stepo de la nunaj Interna Mongolio kaj Siberio.

Ĉu kadukiĝis nun la Silka Vojo? Iasence jes. Tamen en la historio de la homa civilizacio la ĉina Silka Vojo ĉiam funkcias kiel ponto inter la orienta kaj okcidenta kulturoj, kiel simbolo de la amika kontakto inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

La Red.


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





La ruino de Loulan



Turpanaj knabinoj en sunumado de vinberoj



Mogao-ŝtonkavernaro



Jiayuguan-pasejo

Parto de Xi'an

Eterne ĉarmas la Silka Vojo

de CHE MUQI*

EN mia pli-ol-40-jara raportista vivo mi vizitis preskaŭ ĉiujn partojn de Ĉinio, i.a. la vojaĝo al la Nordokcidento estas neforgesebla kaj fierinda por mi.

Mia vojaĝo al la Nordokcidento daŭris 7 monatojn en 1978 kaj 1979. La itinero komenciĝis de Xi'an, trairante Gansu-provincon, kaj finiĝis en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Mi vizitis la Nordan kaj Sudan Xinjiang, rondiris ĉirkaŭ la dezerto Taklimakan, rigardis la tieajn historiajn objektojn kaj serĉis postsignojn de la kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj Okcidento. Mi vojaĝis per ĵipo kaj iafoje ankaŭ rajdis sur kamelo kaj azeno.

17 jaroj pasis post la vizito, tamen en tiu longa tempo la pejzaĝoj sur la Silka Vojo multfoje aperis en mia memoro. Kial la vojaĝo tiel ĉarmas min?

KURIOZAJ PEJZAĜOJ

La Nordokcidento, transpasita de la Silka Vojo, estas aparte ĉarma kompare kun aliaj lokoj de Ĉinio pro sia vasteco, krudeco kaj imponeco.

Kiam mia ĵipo iris profunden de Tianshan-montaro, la aero fariĝis pli kaj pli freŝa, pejzaĝoj pli kaj pli variaj. La ĵipo malrapide transgrimpis monteton. Antaŭ miaj okuloj aperis grandioza pejzaĝo.

Sur la stepo prosperis floroj ruĝetaj, purpuraj, palflavaj kaj blankaj, kiuj formis mirindan bildon. Verdaj piceoj kovris la montvalon. Inter la piceoj kaj la neĝkovrita monto sidas alia monteto kvazaŭ tegita de giganta tapiŝo ore brilanta sub la suno. Fakte, la pejzaĝon faris prosperaj kolzfloroj. Sur la lazura ĉielo blankaj nuboj ŝvebas samkiel flugantaj feinoj en vesto kun longaj manikoj.

Mi estis ravita de la pejzaĝo kaj bedaŭris mian mankon de muzika talento. Alie, mi certe komponus

belan muzikon por prikanti Tianshan-montaron, fierindaĵon de la Okcidento.

Sur la vojo mi foje refoje trafis neatenditajn pejzaĝojn, kiuj ne nur ekscitis miajn sensojn, sed ankaŭ skuis mian animon.

Ambaŭborde de la rivero fluanta de Kunlun-montaro al la dezerto, la aŭtunaj poploj (*Popular diversifolia*) estis aparte ĉarmaj. Rigardate de malproksime, ili similis ne al arboj, sed al pompaj bukedoj.

Pli antaŭe, subite malaperis la subtera akvo, kiu nutris la plantojn. Tie eĉ vivofortaj poploj velkis. En la poplaro mi vidis, ke sur la velkintaj branĉoj tute ne vidiĝas folioj. Mi sentis, ke tie regis la Morto, tamen kun miro mi trovis, ke ĉiu velkinta poplo obstine etendas siajn trunkon kaj brakojn supren, kvazaŭ ili farus kolektivian apelacion. En la morta silento mi kvazaŭ aŭdis fortan krion: "Ni volas vivi! Ni volas vivi!"

BUNTAJ NACIAJ MOROJ

La nacimalplimultaj moroj en la Nordokcidento estas alia granda allogo por la vizitantoj.

En la jaro 139 a.K., kiam Zhang Qian ofievojaĝis al la Okcidento, sude kaj norde de Tianshan-montaro vivis dekoj da malgrandaj regnoj. La loĝantoj okupiĝis pri agrikulturo aŭ pri paŝtado kaj ili plejparte estis saini-oj.

En la longa historia periodo la popolanoj venintaj el orientaj kaj okcidentaj landoj kunfandiĝis kun la tieaj loĝantoj kaj formis la hodiaŭajn pli ol 40 nacimalplimultojn en Xinjiang, interalie, la ujguroj kaj kazaĥoj estas grandnombraj.

Laŭ aspekto oni malfacile distingas ujuguron. Iuj el ili havas flavan haŭton kaj brun-nigrajn okulojn, tre similajn al tiuj de hanoj kaj mongoloj, kaj aliaj



La aŭtoro sur la Silka Vojo

havas profundajn orbitojn, altan nazon, kaŝtanajn harojn kaj blujn okulojn, tre similajn al tiuj de irananoj kaj turkoj.

La diverseco de la haŭtkoloroj kaj vizaĝoj eble devenas de la nacia interŝanĝo kaj asimiliĝo en la historio.

La prapatroj de ujuguroj estis hujhe-oj, kiuj origine loĝis ĉe Bajkalo. Meze de la 9-a jc. la hujhe-a han-lando estis pereigita kaj ĝiaj loĝantoj plejparte migris okcidenten kaj fikslloĝis sude de Tianshan-montaro. En la longa tempo ili asimiliĝis kun la tieaj indiĝenoj kaj poste kun tubo-anoj, ĉidanoj, mongoloj kaj hanoj, kiuj transloĝiĝis en la lokon, kaj iom post iom fariĝis la hodiaŭaj ujuguroj.

La kazaĥoj plejparte estas nomadoj. Ili heredis la kutimojn de la antikvaj rajdemaj nacioj kaj amas migradi. Ili, naturamaj, romantikaj, senĝenaj kaj bravaj, inklinas al libereco. Kun scivolemo mi gatis ĉe ili kaj estis varme akceptita de la ĝentilaj kaj fervoraj paŝtistoj. Tie mi manĝis varman stufitan ŝafajon, trinkis dolĉ-acidan kumison, rigardis amuzan ludon de konkura kapto de ŝafo, partoprenis kanto-konkurson de viroj kaj virinoj. Kaj la plej neforgesebla estis solludo far maljuna paŝtisto. La orelplaĉa melodio ŝvebanta super la senlima stepo dronigis min en dolĉan meditadon.

Ujuguroj ja estas lertaj en kantado kaj dancado, ŝibooj en arkpafado, taĝikoj en flutado kaj kirgizoj en teksado de koloraj tapiŝoj. Ili ĉiuj havas siajn apartajn trajtojn. Estas tre ĝojinde por mi studi ilian originon kaj aŭskulti iliajn popolajn rakontojn.

KRISTALIĜO DE LA ANTIKVA KULTURO

La Silka Vojo kunligis la ĉinan kulturen sferon kun la romana, greka, araba kaj hinda. Ĝi estis ankaŭ vojo, laŭ kiu populariĝis la gravaj religioj budhismo, islamismo kaj kristanismo. Pere de la

vojo eksportiĝis okcidenten silkaĵoj, teo, porcelanaĵoj de Ĉinio kaj ĝiaj kvar grandaj inventoj, dum kukumo, spinaco, ajlo, vinbero, juglando, granato kaj aliaj fruktoj kaj legomoj, kaj precipe kotono kaj kotonaj ŝtofoj pli popularaj ol silkaĵoj, estis enkondukitaj de Meza Azio kaj Eŭropo en Ĉinion. Tiu eksporto kaj importado multe influis la mondon. La granda merito de la vojo kuŝas en tio, ke pere de ĝi la materia kaj spirita civilizacio de la Oriento kaj la Okcidento interŝanĝiĝis, kio multe oportunitis la homan vivon de la Oriento kaj la Okcidento.

Mi komencis la vojaĝon kun profunda sento al la Silka Vojo, kaj la vidaĵoj sur la vojo profundigis mian konadon pri ĝi.

Kun plena seriozeco mi iris ĉirkaŭ la antikva urbo de Ming-dinastio (1368-1644) por serĉi la restaĵojn de Kaiyuan-pordego de Chang'an, la ĉefurbo de Tang-dinastio, kiu siatempe funkciis, kiel komenco de la vojo. Mi vizitis ankaŭ la antikvan urbon Gaochang en Turpan, Xinjiang. De alta teraso mi rigardis ĉirkaŭen kaj vidis ekskluzive ruinigitajn domojn kaj murojn, kiuj kovris 2 milionojn da kvadrataj metroj. Tio estas la plej granda restaĵo, postlasita de la Silka Vojo.

Mi alte taksis la historiajn objektojn elterigitajn ambaŭflanke de la Silka Vojo, ĉar ĉiu el ili montras apartan socian fonon. Ĉiuj historiaj objektoj konigas la kulturen historion de la vojo.

En la Xinjiang-a Muzeo eksponiĝas amaso da bone konservitaj antikvaj silkaĵoj kun ĉarmaj bildoj. Ili estas faritaj en multaj dinastioj kaj la plej antikvaj inter ili estis faritaj en la Orienta Han-dinastio (25-220).




Kameloj estis ĉefa transportilo sur la Silka Vojo. Estis elterigitaj diversloke multaj kamelfiguroj. Inter ili la plej interesa estas trikolora terakota kamelo portanta 5-membran orkestron. Tiu bela kaj pensiga metiartaĵo konserviĝas en la Shaanxi-a Muzeo.

La kamelo kun kolo alte tenata rigardas malproksimen. Sur la ĝibo sidas 4 personoj, ludantaj fluton kaj biron, staras unu persono kantanta. Estas rimarkinde, ke en la 5-membra orkestro 3 estas okcidentanoj kun profundaj orbitoj kaj longa nazo, dum la aliaj portas han-nacian kostumon. Tio montras, ke sur la Silka Vojo la okcidentanoj kaj orientanoj vivis en harmonio.

BELAJ ŜTONKAVERNAJ TEMPLOJ

La grandnombraj ŝtonkavernaj temploj faris la antikvan Silkan Vojon pli bela.

Budhismo naskiĝis en Hindio. En sia disvastiĝo sur la Silka Vojo ĝi postlasis multajn ŝtonkavernajn templojn destinitajn por doni preĝejon al la bonzoj kaj budhistoj en la komenco, sed la ĉefa celo estis faciligi predikadon de budhismo. En la temploj la budhaj kaj bodisatvaj statuoj estis belegaj kaj la freskoj grandiozaj. Ili estas utilaj por pli bone pro-



Fragmentoj de antikva silkaĵoj elarigitaj de la Silka Vojo kaj trikoloraj terakotaj kamelo kaj viro eltrovitaj en Xi'an

pagandi la religion. Jen pro tio la plej altnivela arto estis uzata siatempe. Tamen kun paso de jarcentoj preskaŭ ĉiuj ŝtonkavernoj estis serioze detruitaj, tamen la postlasitaj skulptaĵoj kaj freskoj estas kultataj de la postaj religianoj kaj laikoj pro sia arta nivelo.

La ŝtonkavernoj havas ankaŭ historian valoron. La enhavo de la skulptaĵoj kaj freskoj en la ŝtonkavernoj estas ĉefe pri budhismo, tamen la figuroj de budhoj kaj bodisatvoj kultataj de la religianoj spegulas tiujn de la vivaj homoj en la mondo. La paradizo en la budhismaj sutroj ja estas kristaliĝo de la luksa vivo de la homa mondo, tial la arto de ŝtonkavernaj temploj konservas vivajn bildojn de la kortegoj kaj urbaj merkatoj de diversaj dinastioj. La modernaj homoj povas surscenigi la palacan vivon de Tang-dinastio konsultante sole la bildojn de konstruaĵoj, mebloj, instrumentoj, dancoj kaj kostumoj sur la freskoj en Mogao-ŝtonkavernaro.

La sistema esplorado pri la ŝtonkavernaj temploj sur la Silka Vojo konigas la publikon pri la kultura interŝanĝo kaj asimiliĝo inter la Oriento kaj la Okcidento en la antikveco.

Ŝtonkavernaj temploj originis en la Hinda Duoninsulo. Dank' al orienten-ekspediciado de Aleksandro, la roma kaj greka kulturoj estis pli frue enkondukitaj en la lokon, tial la tiea ŝtonkaverna arto estas evidente influata de la mediteranea civilizacio. Post tio la ŝtonkaverna arto disvastiĝis orienten laŭ la Silka Vojo kaj asimiliĝis kun la hana kulturo de Xinjiang, Gansu kaj aliaj lokoj de Ĉinio.


Kiam mi unuafoje vizitis Mogao-ŝtonkavernaron, mi estis tute ravita de la Giganta Kuŝanta Budho en la kaverno n-ro 158 pro ĝia mistera kvieteco. La harfasono, frunta nevuso kaj robo de la Kuŝanta Budho montras, ke li estas hindo, tamen lia vizaĝo estas tiu de tipa ĉina reĝido, dum la bildoj sur la kapkuseno estas de persa stilo: paro da birdoj staras vizaĝo kontraŭ vizaĝo en perlaroj. La bildo montras la versimilecon kaj graciecon de la greka skulpturo.

La ŝtonkaverna arto konigis la mediteranean kaj hindan kulturon al la Oriento kaj tie asimiliĝis kun la ĉina kulturo. Se oni komparas la diverslokajn ŝtonkavernajn templojn ambaŭflanke de la Silka Vojo, oni do trovos, ke ju pli ili proksimiĝas al la interna parto de Ĉinio kaj ju pli ili estis malfrue konstruitaj, des pli multe ili portas evidentajn ĉinajn trajtojn.

En mia hejmo pendas portreto de budho en Mogao-ŝtonkaverno n-ro 158 kaj portreto de bodisatvo kun persaj trajtoj de la Kumtola Ŝtonkaverno. Ili rememorigas min pri mia vojaĝo laŭ la Silka Vojo. ■

*La aŭtoro estas iama ĉefredaktoro de la japanlingva revuo "Popola Ĉinio".

Nova libro eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo



Mirrakontoj de Liaozhai

La Esperanta versio "Mirrakontoj de Liaozhai" kun 86 pecoj elektitaj el la fama klasika verko "Mirrakontoj de Babilo-ĉambro" de Pu Songling (1640-1715). Prenante popolarakonton kiel materialon de sia verko kaj aplikante romantikismon kaj realismon en kombino kaj lingvon vivecan, li kreis interesajn intrigojn kaj personigis vulpojn kaj fantomojn por esprimi sian indignon kontraŭ la malluma feŭda socio. Li akre kritikis la putran ŝtatan ekzamenan sistemon por elekto de oficistoj kaj malkaŝis la krimojn de la avidaj koruptitaj oficistoj. Li kreis en sia novelaro multajn gustoplenajn rakontojn pri sincera amo de junuloj, kiuj kuraĝe rompis la katenojn de la feŭdisma etiko. La novelaron elĉinigis s-ro Laŭlum.

Formato: 14.5 x 21 cm. (bind.), 624 pĝ. kun 35 nigrablankaj ilustraĵoj en antikva stilo

prezo: 18.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fakto de EPĈ, Libro-servo de UEA aŭ nia peranto en via lando.



BING CHUAN:

LA HISTORIA MUZEO DE SHAANXI

SHAANXI en la norda parto de Ĉinio estas unu el la provincoj de Ĉinio, kiuj havas multe da historiaj objektoj. La Historia Muzeo de Shaanxi estas fama pro abundo da historiaj objektoj inter samnivelaj historiaj muzeoj de Ĉinio kaj konata kiel plej vizitinda loko.

Antaŭe mi estis en Xi'an (Ŝji'an), la ĉefurbo de la provinco, sed mi bedaŭris, ke mi ne vizitis la muzeon pro ĝia rekonstruado. Lastatempe mi refoje alvenis al la urbo kaj vizitis la rekonstruitan muzeon.

La Historia Muzeo de Shaanxi lokiĝas nordokcidente de la antikva pagodo Dayan en Xi'an. La rekonstruita muzeo estas eleganta kaj majesta konstruaĵo kun arkitekturaj trajtoj de Tang-dinastio (618-907), kiu havas strukturajn trajtojn de la ĉina tradicia palaco kaj prezentas kombiniĝon de la klasika stilo kaj moderna arkitekturo.

Mi multe ĝuis la muzeon. Ĝiaj avangardaj instalaĵoj kaj modernaj rimedoj de administrado larĝigis mian vidkampon. Ĉiuj haloj kaj ĉambroj de la muzeo estas provizitaj per facile manipulata klimatizilaro, multifunkcia lumilaro, precizaj fajr- kaj ŝtel-imunaj instalaĵoj kaj sistemo de centra regado. Por protekti historiajn objektojn oni aplikas ekzamenadon, mezuradon,

restituadon kaj aliajn teknikajn rimedojn. La sistemo de mikrokomputera reto estas uzata por protekti la dosierojn de historiaj objektoj kaj dokumentoj. En la 8 000-kvadrata-metra tenejo de historiaj objektoj de la muzeo oni povas reguligi temperaturon kaj humidecon laŭ bezono, kio faciligas protektadon de diversaj historiaj objektoj. Ĝia raporta halo estas provizita per sistemo de simultana interpretado en ses lingvoj.

Laboranto de la muzeo konigis al mi tegolon faritan en Handinastio. En vitroŝranko estas ekspozitaj du specoj da grandaj kaj malgrandaj tegmentrandaj tegoloj rondaj kaj duonrondaj, kun bildo de drako, fenikso, tigro, floroj kaj antikvaj ideogramoj sur si. Tiuj grizaj tegoloj, kiuj pendas sur rando de tegmento, markas antikvan konstruaĵon de Ĉinio. Sen tegmentranda tegolo la ĉina antikva konstruaĵo ne povas esti rigardata kiel perfekta konstruaĵo en stilo de la ĉina nacio. Dekoj da centoj da grizaj tegoloj pendantaj ĉe rando de ĉevronoj faras la konstruaĵon tre okulplaĉa.

Kiel griza fajencaĵo, la tegmentranda tegolo posedas modestan belecon. Kaj krome, ĝi distingiĝas ankaŭ per vejnoj, bildoj de animaloj, vegetaloj kaj ideogramoj pri la konstruaĵo kaj nomo de la konstruaĵo sur si. Tial, ĝi estas tre valora en arto kaj arkeologio.

La plej granda tegmentranda tegolo en la muzeo estas elfosita el la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a.K.). Ĝi estas duonronda, kun alto de 47.5 cm kaj larĝo de 61 cm. Laŭ grandeco de la tegolo imageblas la grandiozeco de la maŭzoleo.

En la ekspozicio de bronzaĵoj estas ekspozitaj diversgrandaj kaj diversformaj bronzaĵoj elterigitaj en la provinco. Bronzaĵoj kulminis en la dinastioj Shang kaj Zhou (la 17-a jc — 771 a.K.). La Okcidenta Zhou-dinastio, la unua parto de Zhou-dinastio (1066-771 a.K.), havis ĉefurbon en Shaanxi-provinco kaj oni elterigis grandan kvanton da bronzaĵoj, kiuj plejparte estis faritaj en la Okcidenta Zhou-dinastio.

En la Okcidenta Zhou bronzaĵoj funkciis ne sole kiel vinujo, ornamaĵo kaj kultaĵo, sed ankaŭ kiel simbolo de reĝeco kaj aristokrateco. La malsameco inter bronzaĵoj de Shang-dinastio kaj tiuj de Zhou-dinastio kuŝas en tio, ke multaj bronzaĵoj de Zhou-dinastio surhavas longan epigrafon pri la socia sistemo, politiko, leĝo kaj komerco de la antikva Ĉinio, gravan por esplori la socion. Ni prenu pladon kun epigrafo de la Okcidenta Zhou-dinastio kiel ekzemplon. La unua parto de la epigrafo prikantas reĝojn de la dinastio kaj iu paraĝo el ĝi prezentas militiron.

La bronzaĵoj kaj terakotaj ho-

moj formas kvintesencon de la ekspoziciaĵoj de la muzeo.

La ekspozicio de terakotaj figuroj vidigas la ĉarmon de ceramiko en la antikva Ĉinio.

En la sklava socio estis praktika kruela homa kunentombigado. Kiam sklavyposedanto mortis, centoj da mortigitoj estis enmetitaj en lian tombon kiel kunentombigitoj. Pro disvolviĝo de la socio kaj bezono de laboruloj la homa kunentombigado estis kritikata kaj fine abolita. Sekve de tio, aperis grandakvante terakotaj kunentombigitoj faritaj imitante al figuro de vera homo. En la muzeo estas ekspoziciataj diversaj terakotaj homoj, sidantaj, starantaj, rajdantaj kaj tenantaj armilon en la mano. La malgrandaj el ili altas je kelkaj centimetroj kaj la grandaj altas kiel veraj homoj en malsamaj pozoj. En la muzeo la plej reprezentantaj estas terakotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, kiuj famas tra la mondo per majesteco, skalo kaj delikateco.

Inter la sennombraj terakotaj viroj estas du virinaj figuroj de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p. K.). Ili, sveltaj kaj en larĝa jupo, sidas unu kontraŭ la alia, kun esprimivaj okuloj. Unu el ili estas tutkorpe blanka, krom la ruĝaj lipoj kaj iom elstarigita ruĝa mamzono.

Granda diferenco troviĝas inter

terakotaj homoj kaj brutoj de Tang-dinastio kaj tiuj de Qin- kaj Han-dinastioj. La antaŭaj spegulas diversajn flankojn de la vivo. Terakotaj ŝtatoficistoj kvazaŭ vidigas altrangajn korteganojn kaj terakotaj junaj muzikistinoj-dancistinoj kvazaŭ aŭdigas belan muzikon en rezidejo de reĝo. En la muzeo vidiĝas ankaŭ terakota poloisto en intensa konkurso, terakota nacimulplimultano rajdanta en ĉasado, terakota knabino en printempa vojaĝo kaj terakota karavano de kameloj okcidenten iranta laŭ la Silka Vojo. Aparte plaĉas tri terakotaj rakontistoj. La ĉefa rakontisto estas barbulo, milda kaj miene humura. Ĉe la unua vido oni trovas, ke li estas pensema kaj oratora. Flanke de li iu sidanto ludas *ŝeng* (blovinstrumento) kaj la alia batas muzikilon. Kvankam la frapinstrumento jam malaperis, la teniĝo tamen atestas, ke li tre ŝatas sian ludatan muzikon.

En la provizora ekspoziciejo 2 500 kvadratajn metrojn vasta estas ekspoziciataj originalaj freskoj el tomboj de Tang-dinastio. En la dinastio furoris luksa entombigo. La imperiestra familio kaj diversnivela ranguloj konkure konstruigis por si luksan tombon kaj faris en ĝi freskojn pri sia luksa vivo. Preskaŭ ĉie sur la muroj de tombo estas freskoj, kiuj plejparte temas pri la vivo kaj palacaj knabinoj. Estas ankaŭ alitemaj freskoj, kia "En ĝentila akcepto" montranta ami-

kajn rilatojn kun najbaraj landoj.


En la Historia Muzeo de Shaanxi la ekspozicio kovras 11 000 kvadratajn metrojn kun pli ol 370 000 historiaj objektoj elterigitaj en Shaanxi-provinco, kiuj konsistigas tri partojn: "Fundamenta ekspozicio", "Portempa ekspozicio" kaj "Speciala ekspozicio". Per la "Fundamenta ekspozicio" en la centro oni konigas la ĝeneralan historion de la provinco, inkluzive de tiu de la antaŭhistoria periodo kaj la dinastioj de Zhou ĝis Qing, kiuj daŭris de la 11-a jc a.K. ĝis 1911. Xi'an estis unu el la famaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Sume 11 dinastioj prenis ĝin kiel sian ĉefurbon kaj la regado daŭris pli ol 1 000 jarojn. La Okcidenta Zhou-dinastio kaj la dinastioj Qin, Han kaj Tang estis plej prosperaj en la ĉina historio. Tial en la urbo abundas historiaj objektoj, kiaj raraj bronzaĵoj de la dinastioj Shang kaj Zhou, terakotaj militistoj kaj ĉevaloj de la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, konstrumaterialoj, oraĵoj kaj arĝentaĵoj de la dinastioj Qin kaj Han kaj trioloraj ceramikaĵoj de Tang-dinastio, sume pli ol 3 000 raraĵoj. ■

Terakota knabino de Tang-dinastio



La plado kun epigrafo





Muso edzinigas sian filinon.
(Novjara bildo)

1996 — la jaro de muso

de YANG ZHEN

LA okcidentanoj difinas la monatojn per 12 konstelacioj. La homoj naskiĝintaj en malsamaj monatoj apartenas do al malsamaj konstelacioj, ekz., kiu naskiĝis en januaro, tiu apartenas al Kaprino; kiu naskiĝis en junio, tiu apartenas al Kankro. La orientanaj moroj similas al la okcidentanaj, tamen kun iom da diferenco. Multaj orientaj nacioj notas la naskiĝaron per 12 bestoj. Laŭ la luna kalendaro de Ĉinio 1996 estos la jaro de muso.

En la jaro, kompreneble, la temo pri muso estos multe priparlata.

LA PLEJ GRANDA GRUPO EL LA MAMULA KLASO

Muso estas unu el la ronĝuloj de la mamula klaso. Musoj kun multaj specioj troviĝas preskaŭ ĉie. Ĉu en komercaj kvartaloj ĉu sur dezertaj altebenaĵoj vidiĝas iliaj spuroj. Ili estas vivofortaj kaj produktivaj. Malgraŭ mortigado kaj venenado far homoj kaj mortigo far katoj kaj serpentoj, ili konsistigas la plej grandan grupon el la mamula klaso. Okcidentaj sciencistoj kalkulis antaŭ nelonge, ke la nombro de musoj estas kvinoble de tiu de la homaro, t.e. en

la mondo vivas 25 miliardoj da musoj, kiuj konkuras pri la riĉfontoj sur la terglobo kun la homaro.

Tio estas tre terura! En la libro "Shi Jing", la unua kolekto de ĉinaj poemoj verkita antaŭ 2 500 jaroj, legiĝas poemo pri musoj. El tio videblas la timo de la antikvuuloj al la musoj. Evidentiĝas, ke la tigroj estas malpli timigaj ol la musoj. Nun la tigroj proksimiĝas al perejo. Se ne estus la homa projekto, ili pereus en la 21-a jc.

Se la musoj estus pli saĝaj, ili eble defius la tigrojn: Kiu devas esti la reĝo de la bestoj.

LA UNUA LOKO INTER LA 12 BESTOJ

La musoj estas vere distingiĝaj per sia timindeco. Inter la 12 ĉinaj bestoj (muso, bovo, tigo, leporo, drako, serpento, ĉevalo, kapro, simio, koko, hundo kaj porko) muso okupas la unuan lokon. La ordo de la 12 bestoj en Ĉinio estas simila al tiu en Hindio, sed la loko de tigo en Ĉinio estas tiu de leono en Hindio. Tio kaŭziĝis eble pro tio, ke en la antikva Hindio ne estis tigo. En Kamboĝo bovo okupas la unuan lokon kaj muso la lastan. En Tajlando serpento okupas la unuan lokon kaj

muso la okan. La landoj kaj regionoj kulture influataj de Ĉinio havas la moron similan, kiel en Ĉinio, escepte de Birmo, kiu difinas la naskiĝtagon per ok bestoj. En Birmo, kiu naskiĝis en jaŭdo, kiel oni diras, tiu naskiĝis en la tago de muso. Se iu naskiĝis en vendredo, oni do diras, ke li naskiĝis en la tago de kobajo.

Kial la musoj okupas tiel altan lokon koncerne la naskiĝaron en la Oriento?

En la antikveco la ĉinoj kredis je dogmo pri *jing* (negativo) kaj *jang* (pozitivo), laŭ kiu ĉiu tago dividiĝis en 12 egalajn tempopartojn. Oni kalkulas la 12 partojn de la tago ekde nul horo, kiu estas entenata en la unua tempoparto de la tago. Ĝi ampleksas ankaŭ la 23-an horon de la lasta tago, alivorte, tiu parto kunligas la hieraŭon kaj la hodiaŭon. La nombro de piedfingroj de la 12 bestoj estas para aŭ nepara. Sole la muso estas escepto. Ĝiaj antaŭaj piedoj havas ĉiu 4 fingrojn, dum la malantaŭaj ĉiu 5 fingrojn. La antikvaj ĉinoj rigardis neparan nombron kiel *jing* kaj la paran kiel *jang*. La muso estas kaj *jing*-a kaj *jang*-a. Ĝiaj antaŭaj piedfingroj montras la hieraŭan *jing*, dum la postaj la hodiaŭan *jang*, tial ĝi estas strikte

ligita kun la unua parto de la tago kaj okupas la unuan lokon inter la 12 partoj. Pro tio la muso okupas la unuan lokon inter la 12 bestoj.

Oni diras ankaŭ, ke la ordo de la 12 bestoj estis difinita en vetkuro. En la komenco la bovo kuris antaŭe, sed la muso lerte saltis sur ĝian dorson, kaj ĉe la fino ĝi etendis sian kapon antaŭen, tial ĝi gajnis la unuan lokon. Kirgizoj diras, ke en la konkurso muso la unua transpasis la riveron kaj atingis la alian bordon, tial ĝi gajnis la unuan lokon.

Koncerne la ordon estas alia rakonto. Ĝi tekstiĝas: Antaŭe kato kaj muso estis amikoj. Antaŭ la konkurso la kato petis la muson anonci ĝian nomon, sed la muso zorgis nur pri si mem kaj tute forgesis sian amikon, pro tio la kato estis forpelita el la ordo. La kato komencis malami la muson kaj ĉiam mordis ĝin. Tamen la rakonto ne montras, kial la muso okupas la unuan lokon.

Alia rakonto diras, ke la 12 bestoj estas elektitaj post prijuĝo. Bovo okupis la unuan lokon, ĉar ĝi, tre granda, multe kontribuis al la homaro. Muso malkonsentis pri tio kaj trumpetis, ke ĝi estas la plej granda. Je tio ridis ĉiuj aliaj bestoj. La muso do petis, ke ĉiuj bestoj eliru por aŭskulti, kiel la homoj opinias. Sur la strato ĉiuj laŭdis, ke la bovo estas forta, sed neniu opiniis, ke ĝi estas granda. Tiam la muso subite saltis sur ĝian dorson, kio mirigis ĉiujn apudstarantojn. Ili moke diris: "Ho, kiel granda muso!" La muso do rigardis aliajn bestojn, dirante: "Ĉu vi aŭdis, ke la homoj opinias, ke mi estas granda?" La apudstarantoj ne montris malkonsenton kaj lasis, ke la muso okupu la unuan lokon.

Multaj faris esploradon por trovi ĝustan kaŭzon. Do oni informiĝis pri alia diro: En la prahistoria periodo la universo estis tute ĥaosa. La muso mordis la ĥaoston en la unua parto de la tago kaj apartigis la ĉielon disde la tero kaj poste la bovo ekspluatis la teron

en la 2-a parto de la tago. Pro tio la muso okupis la unuan lokon inter la 12 bestoj. Ĉu la muso vere apartigis la ĉielon disde la tero? Oni neniel povas certiĝi pri tio, tamen en la unua parto de la tago, alivorte, en la noktomezo, plej viglas la musoj.

Ĉiuj tiuj rakontoj ne estas solidaj atestoj. Tamen la rakontoj, en kiuj la musoj estas tre spritaj kaj bonŝancaj, vere riĉigis la folkloran kulturon.

MUSO EDZINIGAS SIAN FILINON

La 25-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas Festo de Ĉiela Grentenejo. Oni diris, ke antaŭ tre longa tempo en norda Ĉinio regis trosekeco dum 3 jaroj. Malgraŭ la mizera vivo de la popoloj, la regantoj daŭre superimpostis al ili, sekve de tio ĉie vidiĝis mortintoj de malsato. Iu kompatema oficisto de grentenejo malfermis la grenejon kaj disdonis grenon al la malsataj popoloj. En la 25-a de la unua monato li bruligis la tenejon kaj finis sian vivon en la incendio. Memore al la bonkora oficisto, kiu oferis sian vivon por la popoloj, la 25-an de la unua monato oni faras grenej-similajn cirklojn en la korto aŭ draŝejo el cindro kun greno ene kaj metas tegolojn sur la grenon. Tio simbolas, ke la tenejo estas plena de greno.

Tiutage la grenaj komercistoj kultas dion de grentenejo. Antaŭ longe la ministro de financo superimpostis al la popoloj kaj devigis ilin pagi la perdon de grentenejo kaŭzitan de konsumado far birdoj kaj musoj. Oni malamegis la koruptiĝintajn ŝtatoficistojn kaj musojn, sed ili povis fari nenion por haltigi ties fiagon. La popoloj do petis la favoron de la dio, por ke la musoj ne tro multe konsumu grenon.

Tiunokte estas malpermesate lumigi lampon, ĉar la festo estas edziĝa tago por la musoj kaj oni ne devas fari malutilon al ili. La edzinigo de sia filino far musoj

estas ofte vidata sur novjaraj bildoj kaj papertondaĵoj. La musaj novedzino, novedzo, honoraj fraŭloj kaj fraŭlinoj ĉiuj en ruĝa jako kaj verda pantalono iras en grupo. La sceno estas solena kaj komika. La edzinigo de sia filino far musoj ja ne okazas ekskluzive la 25-an de la unua monato. Ĝi okazas ie la 10-an de la unua monato. En la punkto de la tago oni devas lumigi lanternojn por la musoj. En Jinhua (Ĝinhua), Zhejiang (Ĝeĝjang), la festo okazas la duan de la dua monato. Tiutage oni bakas sojfabojn, miksas la bakitajn sojfabojn kun bruna sukero kaj disĵetas ilin en la angulojn de la ĉambro.

Ĉinaj nacimalplimulto havas ankaŭ iujn aliajn festojn kaj morojn rilatajn kun musoj: Ĝinooj havas musaĵ-maĝan feston. Mjaŭoj pasigas mus-eksterman feston. Koreoj bruligas herbojn sur kampoj en la unua monato por forpeli la musojn. Tamen en tiuj tradiciaj festoj la musoj ĉiuj estas persekutataj, malbenataj kaj mortigitaj.

Oni malamas la musojn, ĉar ili faras damaĝon al grenplantoj, arbaroj kaj stepoj, ŝtelas grenon kaj komunikas peston. Ili ĉion mordas, tio estas plej malbeninda. La dentoj de ronguloj kreskas senĉese kaj la bestoj devas froti ilin por mallongigi la dentojn. La musoj rongas vestojn, meblojn kaj eĉ domojn. Fakte, ne ĉiuj musoj estas malutilaj al la homoj. Iuj specioj estas ja valoraj, ekz., kojpo kaj kobajo, kiujn la homoj protektas kaj bredas. Musoj (*Myospalax psilurus*) estas malutilaj al stepoj kaj kampoj, tamen en la lastaj jaroj oni informiĝis, ke ilia osto povas esti uzata por kuraco de reŭmatismo. Tio estas utila al la sano de la homo. Ĝuste pro tio, antaŭ 12 jaroj Ĉinio emisiis poŝtmarkon kun bildo de muso.

Fama ĉina pentristo Huang Yongyu pentris muson kun surskribo "Mi estas malbela, tamen mia patrino amas min!" ■

Universitato por maljunuloj

POST emeritiĝo antaŭ 17 jaroj, kuracistino He maldungis la servistaron kaj mem ekpripri zorgis sian 30-jaran kriplan filinon, kiu ne povas zorgi pri sia ĉiutaga vivo. En longa tempo la 67-jara s-ino He suferis pezan hejmlaboron.

Antaŭ 4 jaroj ŝi eklernis ĉinstilan pentrarton en Haidian-Universitato por Maljunuloj de Pekino. Iom post iom ŝi fariĝis serena kaj aspektas pli juna kaj ofte diras al aliaj: “En lernado de pentrarto mi forgesas ĉian ĉagrenon. Maljunuloj ofte sentas sin neglektitaj, tamen en la universitato por maljunuloj mi tute ne sentas tion. Ni, ĉiuj kunlernantoj vivas frate kaj plezure.”

En Haidian-Universitato por Maljunuloj multaj lernantoj samopinias kun ŝi.

IDEALA LOKO POR MALJUNULOJ

Pro pliboniĝo de la vivaj kaj kuracaj kondiĉoj, plilongiĝas la vivo de ĉinaj maljunuloj, kies procento en la tuta loĝantaro pli kaj pli kreskas. Nun en Ĉinio vivas ĉ. cent milionoj da maljunuloj kaj tio fariĝis grava socia problemo. Ĉinoj havas bonan tradicion — respekti maljunulojn. Por ke la maljunuloj estu feliĉaj en sia maljuneco, de post 1983, fondiĝis ĉ. 5 000 altlernejoj kaj lernejoj por maljunuloj en Ĉinio, kie lernas ĉ. 500 mil lernantoj.

La Haidian-Universitato por

Maljunuloj fondiĝis en 1984. La altlernejo funkciigata de popola organizo kaj financata de la registaro akceptas pli-ol-50-jarajn lernantojn el la tuta urbo. En Haidian-distrikto de nordokcidenta Pekino situas multaj universitatoj kaj institutoj. Konsiderante la lokajn trajtojn kaj bezonojn de la maljunuloj, la universitato kun celo lernigi kaj ĝojigi maljunulojn fondis kursojn pri literaturo kaj historio, ĝardenistiko, sigelila gravurado, tapetado de pentraĵoj, sanigaj sportoj ktp. Inter ili la kursoj pri pentrado kaj kaligrafado ludas gravan rolon. Centoj da fakuloj, profesoroj, kaligrafoj kaj pentristoj estis engaĝitaj kiel ĝiaj instruistoj. La universitato kompilis “Lernolibro de Altlernejoj

por Maljunuloj”, faris kaseton pri lernado de kaligrafio kaj pentrarto. Ĝi okazigis pekinan, ĉinan kaj internacian ekspoziciojn de kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj. Ĝiaj membroj plurfoje partoprenis en tutlandaj seminarioj por interŝanĝi spertojn, trifoje partoprenis la internacian seminarion pri maljunula edukado, venis al la altlernejo vizitantoj de 27 provincoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ĉirkaŭ 4 000 lernantoj diplomitiĝis de la universitato en la lastaj 10 jaroj. 50 diplomitoj nun laboras kiel instruistoj de pentrarto. Iuj kursanoj okazigis ekspozicion de pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj. Verkoj de kelkcent lernantoj publikiĝis en ĵurnaloj. Iuj gajnis premiojn en tutlanda konkurso de pentraĵoj.

S-ro Yang Quanyi instruanta pentradon



La pentraĵoj de ĝiaj kursanoj estas vendataj en magazeno aŭ konservataj en muzeoj... Oni rigardas ĝin kiel "Artan Sanatorion", kiu fervore servas al la maljunuloj. Antaŭ la grandaj sukcesoj, la fondinto de la universitato, pli-ol-70-jara direktoro Qi Xin (Ĉji Ŝin) restas modesta kaj atribuas la meriton al diversaj sociaj rondoj, al la emeritoj, kiuj volontule laboras, kaj al la instruistoj kaj lernantoj.

MALJUNULOJ MEM FARAS ĈION

En la universitato ĉiuj funkcioj estas maljunuloj. La administrantoj senescepte estas emerito-volontuloj entuziasmaj pri tia edukado. Multaj el la instruistoj estas emeritaj profesoroj kaj fakuloj.

Vicdirektoro de Kaligrafia kaj Pentrarta Fakultato, s-ino Lu Zimin estas 65-jara vigla maljunulino elegante vestita. Ŝi akompanis min en vizito de lernoĉambroj. Ŝi, estinta instruisto de la ĉina lingvo en mezlernejo, eklernis pentradon kaj kaligrafadon en la universitato kaj laboras por ĝi post sia emeritiĝo. En la pasintaj 7 jaroj ŝi laboris 4 duontagojn ĉiusemajne kaj zorgis pri 3 kursoj pri pentrado kaj kaligrafio. Ŝi diris al mi: "Mi estas facile kontentigebla. Mi laboras ĉi tie ne por mono, sed por farion. Pentrado kaj kaligrafado povas riĉigi nian spiritan vivon. Mi estas tre ĝoja amikiĝi kun la lernantoj el diversaj lokoj kaj servas al ili. Tio estas daŭrigo kaj evoluiĝo de mia antaŭa profesio."

Instruisto de mezgrada kurso pri pentrado, s-ro Yang Quanyi (Jang Ĉjŭanji) estas pli juna ol siaj lernantoj. La 51-jara Yang kumule laboris tie 6 jarojn. Li estas talenta en la ĉinstila pentrado kaj tre facile trovas pli multe salajratan laboron. Tamen li preferas la tiean instruadon

kaj deziras disvastigi ĉinstilan pentradon. S-ro Yang estas tre kontenta kaj ĝoja, vidinte, ke liaj maljunaj lernantoj progresas. Li diris: "Instruante, mi ankaŭ lernas de la kursanoj, kiuj pene laboras konstante dum multaj jaroj. Tio inspiras min, homon pli junan ol ili, serioze labori kaj neniam malfruiĝi al la lernejo senkaŭze."

LERNANTOJ NE VOLAS DIPLOMITIĜI

La meznombra aĝo de la tieaj lernantoj (duono de ili estas virinoj) estas 64 jaroj. Inter ili estas profesoroj, aliaj altrangaj intelektuloj, laboristoj, kamparanoj, ministroj kaj generaloj. Iuj el ili venis el Japanio kaj Taiwan de Ĉinio. Dank' al la sukcesa edukado kaj harmonia kunvivado, la maljunaj lernantoj ne plu sentas solecon. Ili riĉigis sian spiritan vivon kaj fortigis sian scivolemon kaj progresemon. Multaj ne volas diplomitiĝi eĉ post 4-5-jara lernado.

La 73-jara s-ro Yang Yizhi ek-

lernis tie tuj eĉ la fondiĝo de la lernejo. En la Liberiga Milito de Ĉinio (1946-1949) li vundiĝis kaj tortikoliĝis. Lia dekstra brako ne povas libere moviĝi pro ostarompo. Malgraŭ la malfaciloj, en la pasintaj 11 jaroj, du tagojn ĉiusemajne li venis al la universitato por lerni pentradon kaj kaligrafion. Li diris: "Post pentrado kaj skribado mi sentas min tre ĝoja kaj forgesas ĉiujn dolorojn." Li lertas en *likaligrafio* (speco de skriba formo de ĉina lingvo vaste uzata en Han-dinastio). Liaj kaligrafiaĵoj estis prezentitaj en la "Ekspozicio de pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj en Tokio" kaj publikigitaj en la "Ĵurnalo de Ĉinaj Maljunuloj".

Estro de kurso pri flor-birda pentrado, 64-jara s-ino Chen Dunhui estas ĉiam optimisma antaŭ la malfaciloj. Ŝi diris: "Mi estas feliĉa, ĉar Haidian-Universitato por Maljunuloj donas al mi eblecon lerni la tradicion ĉinan arton. Mi kun ĝojo rekomendas al maljunaj amikoj tiun ĉi 'Artan Sanatorion'." ■

Paco-kompanio por Konsultiĝo pri Internaciaj Aferoj en Anhui, Ĉinio

Registrita ŝtata komerca numero: 14896279-1

Internacia interŝanĝo de kulturaj kaj komercaj talentuloj

Konsultiĝa servo por alilandaj investantoj, turistoj kaj fakuloj

Importo kaj eksporto de komercaĵoj

Servo por internacia geedziĝo


Serĉo de esperantistaj aŭ neesperantistaj komercaj kunlaborantoj aŭ agentoj

Starigo de dudirektaj agentejoj por ĉinaj kaj alilandaj entreprenistoj

Kunlaboro kaj kontakto de esperantistoj estas bonvenaj.

Adr: Direktoro s-ro Lin Bo, P.O. BOX 2, Hefei 230001, China P.R.

Tel/Fax: +86-0551-4484606, 2634063, 2634400-2806



S-ro Li Changjiang en pentrado

MIA VIVO

Senbrakulo kapabla je pentrado

de LI CHANGJIANG

En la lasta somero venis de la urbo Hegang, Heilongjiang(Hejlongĝjang)-provinco, juna senbraka pentristo. Li aranĝis en la Ĉina Belarta Domo de Pekino malgrandan ekspozicion de pentraĵoj. La ekspozicio altiris al si multajn vizitantojn. Iuj skribis gratulajn kaj kuraĝigajn vortojn en la ekspozicia notlibro, aliaj donis al li sian adreson kaj deziris helpi lin en ajna tempo. Iu pli-ol-60-jara korea virino diris kun larmoj: "Ho, brava knabo!" kaj volis donaci al li 100 juanojn. Li Changjiang (Li Ĉangĝjang) ploris de emocio. Li diris: "Mi dankas la amikojn pro iliaj helpo kaj zorgo. Mi certe faros ĉion eblan por rekompenci tiun ĉi belan mondon!"

La Red.

ANTAŬ 20 jaroj, kiam mi estis 11-jara, min trafis elektro-ŝoko kaj pro tio mi perdis la du brakojn kaj tri pied-fingrojn. Mia vivo falis en abismon. Tamen helpate de miaj familianoj kaj aliaj bonkoraj homoj, mi postvivis la malfeliĉon kaj mia vivo ekbrilis de novaj sparkoj.

STRIO DA LUMOJ EL LA MALESPERO

Post kiam mi ĉesigis lernadon, min akompanis malsano, doloro, larmoj kaj malespero. Hazarde, mi kaptis per la buŝo kraĵonon de mia fratino kaj per ĝi mi mallerte skribis mian nomon. Poste mi provis kopii pentraĵon per plumo tenata per la buŝo, tial iom post iom mi absorbiĝis en pentrado. Mi kvazaŭ trovis mian bonan amikon kaj en liberaj horoj mi faris pentraĵon, tenante en la buŝo penikon alligitan al ligna bastoneto. Mi eluzis multajn penikojn. Sur ĉiuj paperpecoj en mia hejmo mi faris pentraĵon.

Helpate de belartaj instruistoj en mia hejmloko, en 1983 mi unuafoje partoprenis la ekspozicion de pentraĵoj en la urbo Hegang. Mia pentraĵo "Flugu pli alten" gajnis specialan premion. Tiu honoro havigis al mi grandan fidon pri la estonteco. Mi energie pentris kaj samtempe lernis. Tiam mi komencis fari kaligrafiaĵon per

peniko tenata per la buŝo. Mi provis fari ankaŭ versaĵojn. Mia penado ja ne vanis. Ĉi-foje en la pekina ekspozicio estis miaj pli ol 40 pentraĵoj de lotusfloroj, vintraj ume-floroj, firmaj pinoj, verdaj bambuoj, flugantaj hirundoj kaj blankaj kolomboj kaj ankaŭ miaj kaligrafiaĵoj, el kiuj la plej kontentiga por mi estis la kaligrafiaĵo "Senbrakulo kapabla je pentrado".

VARMA HEJMO

Nokte, kiam mi vekiĝis el inkubsonĝo kaj konsciis, ke mi jam perdis la brakojn, mi tuj dronis en malespero. Tiam miaj gefratoj, kiuj akompanis min ĉe mia lito, konsolis min: "Ho, mia fraĉjo, ne ploru! Niaj manoj estas sub via dispono."

Miaj gepatroj estas karboministoj. Kvankam malalte klerigitaj, ili subtenis min en pentrado. Kiam mia patrino revenis al Hegang post vizito de la naskiĝloko Shandong, ŝi kunportis por mi grandan inkfrotujon. Mia pliaĝa frato akompanis min al belarta kurso. Antaŭ sia edziĝo mia alia frato diris al mi: "Fraĉjo, mi petas de vi neniun donacon, escepte de via pentraĵo. Mi pendigos ĝin en mia ĉambro."

Mi povas tranĉi paperon per la buŝo, piedoj kaj stumpo de miaj amputitaj brakoj. Per ili mi povas ankaŭ froti inkon, fari pentraĵon, manĝi, lavi vestojn kaj eĉ fari foton. Tamen mi, sen brakoj, ne po-

vas zoni mian talion. Mi venkis la malfacilojn en la vivo, helpate de miaj fratoj, bonkoraj kunlernantoj kaj amikoj.

En 1987 mi edziĝis. Malgraŭ forta malkonsento de siaj familianoj mia amikino edziniĝis al mi. Nun ni havas amindan filon. Mi kaj mia edzino kune funkciigas butikon de manĝaĵoj kaj ĉiutagaj bezonaĵoj kaj ankaŭ malgrandan restoracion por vivteni la familion. Por la ekspozicio mi luigis mian restoracion kaj prunteprenis grandan monsumon de mia amiko. Mi tre ĝojis, ke mia ekspozicio estis sukcesa.

MIA DEZIRO

Mi multe rikoltis el la ĉi-foja vojaĝo en Pekino. Mi konatiĝis kun multaj amikoj. Mi vizitis la Centran Belartan Instituton kaj multajn galeriojn. Dank' al la vizito mi multe larĝigis mian vidkampon kaj trovis miajn mankojn en pentrado. Reveninte hejmen, kiel kutime, mi havos malfacilojn en ordinara vivo kaj elspezo por la vivo kaj kariero, tamen mi firme kredas, ke mi certe venkos ĉiujn malfacilojn kaj pli diligente lernos pentrarton.

Mi havas fortan deziron, ke en 1997 mi aranĝu alian ekspozicion de pentraĵoj en Pekino. Mi esperas, ke miaj eksponitaĵoj estos pli bonvenaj. ■

ANTAŬ tri jaroj la 17-jara knabo Xue Liansheng (Ŝjue Ljanseng) estis operaciita per grefto de lieno deprenita de lia patrino. Antaŭ la grefto la knabo suferanta de hemofilio povis nur iri surgenue kun fleksita korpo. Post la operacio li povas rektigi la talion, iri kun bastono kaj viziti lernejon. Dum la tri jaroj la sukcese greftita lieno ĉiam laboras normale.

Laŭ statistiko de Nomlisto de Tutgloba Grefta Centro en 1994, dank' al sukcesa grefto pli ol 400 mil pacientoj suferintaj de lastperiodaj gravaj malsanoj havigis al si novan vivon. Nun estas granda nombro da longtempaj postvivantoj, kies greftita organo bone funkcias. Ili bone laboras. Iliaj korpo, psiko, spirito kaj familia vivo sin trovas en normala stato.

Organa grefto aperis en Ĉinio malfrue, tamen disvolviĝas rapide. Ekde la 60-aj jaroj ĝis nun oni faris greftadon de 25 specoj da organoj, histoj kaj ĉeloj de malsamaj individuoj. Inter ili estas greftado de reno, hepato, koro, pulmo, pankreata insuleto, pankreato, lieno, paratiroido, surrena glando, medolo, cerba glando, testiko kaj aliaj.

Inter la greftoj de diversaj organoj tiu de reno estis plej multe farata kaj ĝis nun oni jam faris 10 mil kazojn de tia operacio. En Ĉinio 90 hospitaloj kapablas fari greftadon de reno. Ĝis la fino de 1994, la nombro de la pacientoj kun greftita reno, vivintaj pli ol 5 jarojn, superis mil kaj pli ol 200 pacientoj kun greftita reno vivis pli ol 10 jarojn.

Ekde la 90-aj jaroj, Ĉinio atingis grandan sukceson ankaŭ en greftado de gravaj organoj. Ekzemple, en 1992 estis 12 kazoj de greftado de koro. Inter ili 3 operaciitoj vivis pli ol 2 jarojn, unu jam vivis pli ol 3 jarojn kaj la greftita koro funkcias bone. Estis faritaj pli ol 60 operaciitoj de hepata grefto. Antaŭe tia operacio estis farata ĉefe al pacientoj de

YI XIU:

Organa grefto en Ĉinio

lastperioda hepata kancero kaj post la operacio la malsano facile recidivis kaj la pacientoj ne vivis longe. Nun la operacio celas ĉefe al pacientoj de lastperioda benigna hepata malsano. Bona turniĝo videblas espereble.

Krome surbaze de la sukceso de besta eksperimentado, oni komencis klinikan aplikadon de greftado de porka pankreata insuleto. La operaciitoj senescepte estas diabetuloj de I-a tipo malsaniĝintaj antaŭ 5-22 jaroj kaj la greftita porka pankreata insuleto povas vivi kaj ludi sian funkcion. Tio faris Ĉinion la 4-a lando, kiu kapablas fari greftadon de malsamrasa organo, post Kanado, eksa Sovetunio kaj Svedio.


De la lastaj jaroj, Ĉinio faras ankaŭ greftadon de cerbaj nervoj kaj ĉeloj. Tio liveras novan ŝancon al kuracistoj por kuraci parkin-


sonan malsanon, nanismon, koreon, malbonan kreskon de cerbo kaj aliajn malsanojn.

Nun en Ĉinio dekoj da medicinaj establoj sin okupas pri esplorado kaj klinika aplikado de organa grefto. Laŭ konigo de profesoro Qiu Fazu (Ĉiŭ Fazu), unu el la fondintoj de la ĉina organa greftologio kaj honora rektoro de la Medicina Universitato Tongji (Tongĝji), la esplorado pri organa grefto en Ĉinio komenciĝis en la 70-aj jaroj, je 10 jaroj malpli frue ol iuj avangardaj landoj de la mondo. Tamen nun Ĉinio jam kapablas grefti ĉiujn organojn, kiel aliaj landoj en la mondo.

Tamen, profesoro Qiu diris ankaŭ, ke kvankam en la lastaj jaroj Ĉinio gajnis iujn sukcesojn kun monda nivelo en grefta esplorado, tamen al la monda nivelo en klinika operaciado ĝi ankoraŭ havas

Organa greftado





Prof. Wu Jieping

HOU JUELIANG:

Elstara uro- kirurgo Wu Jieping

MI intervjuis profesoron Wu Jieping (U Ĝjeping) en hospitalo, kiam li ricevis korpoekzamenon. Sed mi vidis lin laboranta. Rimarkinte mian eniron, li turnis sin al mi kaj manpremis kun mi.

“Bonvolu ion diri pri via pasintaĵo,” mi petis.

S-ro Wu ridetis, kapjesis kaj komencis rakonti pri sia pasinteco, fikse rigardante min.

PREFERO DE LA PATRO

S-ro Wu aĝas 79 jarojn. Lia patro estis prudenta entreprenisto. En la epoko, en kiu vivis lia patro, la vivo de la popolo estis mizera kaj senlaboreco tre serioza. Konsidere la realecon de la socio, la patro

rimarkindan distancon.

Unu el la ĉefaj kialoj estas manko de bezonataj organoj. Ĉinio nun ankoraŭ ne akceptis la sciencan nocion, ke morto de cerbo ja signifas morton de la tuta korpo, kaj daŭre juĝas morton laŭ ĉeso de korbato. Krome ĉinaj tradiciaj moroj kaj kutimoj, morala kriterio kaj leĝa difino nun ankoraŭ ne permesas depreni organon de la korpo kun korbato. Ĉio ĉi limigis la kvaliton kaj nom-

bron de greftaj organoj kaj ankaŭ la efikon de grefta operacio.

Alta kosto de grefta operacio estas ankaŭ grava faktoro por kateni disvolviĝon de la greftado. Ekzemple, por hepata grefto oni bezonas pli ol 100 mil juanojn, kaj krome, la imunaj medikamentoj prenendaj de la pacientoj plejparte estas importitaj, kies kosto estas multe super la pagipovo de la ordinaraĵoj ĉinoj.

Fakuloj opinias, ke se la uni-

decidis, ke liaj gefiloj lernu medicinon kaj estu bonaj kuracistoj. La infanoj obeis la patron. Pli ol 30 personoj de tri generacioj de la familio fariĝis kuracistoj.

De sia juneco Wu Jieping pene klopodis por fariĝi elstara kuracisto. En la aĝo de 16 jaroj li eniris en preparan kurson de medicina universitato en Pekino, kaj post tri jaroj li eniris en la Medicinan Instituton Konkordo funkciigatan de Rockefeller de Usono. La instituto estis unuaklasa siatempe en la mondo. Wu Jieping diligente lernis kaj post kvin jaroj li doktoriĝis. Tiam li estis 24-jara.

SINCERECO DE FREMDLANDA MENTORO

En 1947, 30-jara Wu Jieping venis al Usono por

versala nocio “morto de cerbo ja signifas morton de la tuta korpo” povos esti agnoskita kaj aprobita de la socio kaj leĝoj de Ĉinio, oni povos preni cerbo-mortintojn kiel fonton de greftaj organoj kaj samtempe fondi landskalan registran retan ekipitan per altrapida trafikilo por selekti plej bonajn liverantojn kaj akceptantojn, tiam en Ĉinio des pli multaj pacientoj havigos al si novan vivon pro ĝustatempa efika grefto. ■

daŭrigi studadon. En la Ĉikaga Universitato li studis ĉe profesoro Harkins. Li estis Nobel-premiito kaj fondinto de endokrina kuracado de tumoroj. Kaj tiam tiu fako estis blanko en Ĉinio. Do sub la direktado de s-ro Harkins Wu Jieping laboris super studado pri urokirurgio.

Diligenteco kaj inteligenteco de Wu Jieping tre plaĉis al s-ro Harkins. Foje, li disvolvis por Wu la planon de la scienc-esplora domo de la universitato kaj diris al li, montrante lokon sur la plano: "Jen via laboratorio."

Wu Jieping estis certa pri la sincereco de la mentoro, sed li pensis, ke li estas ĉino kaj devas progresigi urokirurgion en la patrolando. Tial li studis pli diligente por reveni al ĝi pli frue. Decembre de 1948, ĉe la liberiĝo de la patrolando, Wu Jieping revenis al la hejmlando, fordankinte la afablan retenadon de la mentoro.

KURACI SEN DISTINGO DE SOCIAJ RANĜOJ

Multaj ĉinoj bone scias, ke antaŭ 2 500 jaroj estis la granda edukisto Konfuceo, kiu havis 3 000 instruojn. Li akceptis ĉiujn lernantojn sen distingo de iliaj sociaj rangoj.

Kaj doktoro Wu Jieping akceptis ĉiujn malsanulojn sen distingo de iliaj sociaj rangoj. Ĉiuj pacientoj ricevis lian varman akcepton.

Iama indonezia prezidanto Soekarno perdis la renan funkcion kaj la ĉina ĉefministro Zhou Enlai komisiis al Wu Jieping la kuracon de prezidanto Soekarno. Doktoro Wu sukcesis en resanigo de Soekarno, kaj poste ĉi tiu ekskluzive petis kuracon far Wu. En 1972 Wu Jieping diagnozis laŭ urina analizo, ke ĉefministro Zhou suferis de urinvezika kancero. Poste Wu Jieping faris operacion al la ĉefministro.

D-ro Wu entuziasme akceptis ne nur altranguojn, sed ankaŭ malaltranguojn kaj eĉ ordinarajn malsanulojn. Kiam li funkciis kiel estro de la Dua Medicina Instituto de Pekino, li ofte kuracis laborantojn de la instituto kaj iliajn familianojn. Poŝtaĵo-distribuanto de la instituto suferis de kancero kaj petis helpon de d-ro Wu. Li senhezite konsentis kaj faris al li operacion. Nun tiu laboranto ankoraŭ vivas sane.

La patrino de kadavrogardisto Zhao Hong de la dissekcejo de la Dua Medicina Instituto de Pekino suferis de malsano en la kamparo, kiom tre maltrankviligis Zhao. Informiginte pri la afero, d-ro Wu veturis sola per aŭtobuso en la kamparon kaj faris kuracon al ŝi.

Por Wu Jieping, ĉu ŝtataj gvidantoj, ĉu ordinaraj kamparanoj, ĉiuj estas egalaj en la socio.

ABUNDAJ FRUKTOJ

Mia intervjuo faris al mi la impreson, ke d-ro Wu ne ŝatas paroli pri siaj sukcesoj. Antaŭ la vizito mi legis kelke da raportaĵoj pri d-ro Wu kaj sciigis, ke li multe kontribuis en studado pri vira steriligo, rena grefto, kuraco de prostata kaj urinvezika kanceroroj. Li publikigis 150 disertaciojn kaj partoprenis en verkado kaj kompilado de 20 libroj, kaj kompilado de 17 libroj estis sub lia gvidado. Iu el la verkoj jam reeldonita 6-foje. Li direktis la kompiladon de "Sek-sologio", kiu ludis gravan rolon en seksa edukado por gejunuloj. Steriligo kaj seksa edukado ludas pozitivan rolon en naskolimigo kaj malmultigo de seksaj krimagoj.

D-ro Wu diris, ke li estas kontenta je tri sukcesoj. La unua estas venko super ambaŭrena tuberkulozo. Tuberkulozo sur unu reno ne mortigas, sed sur ambaŭ estas nekuracebla. Antaŭ ĉ. 40 jaroj miloj kaj miloj da homoj mortis de tiu malsano. Sed d-ro Wu trovis, ke parto de la kazoj estis erare diagnozita. Li trovis la kaŭzon de la eraro, proponis novajn metodojn de diagnozo kaj kuraco. Dank' al tio parto de la nekuraceblaj malsanuloj estis savitaj.

La dua sukceso estas konfirmo de maloftega malsano — adrenalna mjela proliferado. Trovi kaj konfirmi novan malsanon estas tre malfacile en medicino. Kutime oni metas la nomon de la trovinto antaŭ tiun de la nove trovita malsano por honori lin. La simptomo de la malsano nove trovita de d-ro Wu estas kvazaŭ hipertensio, kaj oni neglektis ĝin. En 10-jara esplorado li kolektis materialojn de 17 malsanuloj suferantaj de la sama malsano kaj konkludis, ke adrenalna mjela proliferado estas malsano. En la usona "Urokirurgia Jarlibro" de 1979 oni publikigis disertacion de d-ro Wu kaj opiniis, ke la disertacio estas interesa, sed la nove trovita malsano bezonas alies ateston. Sep jarojn post tio, oni trovis tiun malsanon kaj atestis la trovon de d-ro Wu.

La tria sukceso estas nova vidpunkto pri kompen-sa kresko de resta reno. Ĝenerala opinio estas, ke fortranĉo de unu reno ne minacas la vivon, ĉar la resta reno havas la funkcion de kompen-sa kresko, kaj la unurenulo povas vivi sane. Sed d-ro Wu malsamopiniis. Li trovis, ke ne ĉiuj malsanuloj havas saman kompen-san kreskon de la resta reno. Iuj havas bonan kompen-san kreskon kaj povas vivi sane, dum aliaj, sen ĝi, ne povas vivi sane kaj estas eĉ minacataj de la morto. Kie estas la kialo de la diferenco? Tion klarigis d-ro Wu per malsameco de aĝo. Li diris, ke li daŭre esploras en tiu flanko, kaj li celas trovi metodon fortigi la funkcion de kompen-sa kresko de la resta reno kaj longigi la vivon de la malsanuloj.

Fine, d-ro Wu diris al mi, ke la urokirurgio de Ĉinio havas vastan perspektivon. Lastatempe fondiĝis la Ĉina Urokirurgia Fonduso. Li opinias, ke la fonduso ludos gravan rolon por disvolvi sciencojn, kulturi talentulojn kaj kuraĝigi postgigintojn. ■

EKONOMIO

● En 1994 la totala nacia produktovaloro de la ŝtataj agrokultivejoj de Ĉinio atingis 33.4 miliardojn da juanoj, t.e. 3.4-oble pli ol tiu en 1978. Dank' al efektivigo de reformado kaj por-domalfermo kaj la "tri centoj da konstruoj" farataj en la agrikultura sistemo, nome elekti cent ŝtatajn agrikulturajn entreprenojn kiel provpunktojn por moderna entreprena sistemo, organizi kaj disvolvi cent entrepreno-grupojn, konstrui kaj disvolvi cent entreprenojn de bonrasaj semoj, ŝanĝiĝis la situacio, en kiu la agrokultura sistemo deficitis en la sinsekvaj 12 jaroj antaŭ 1978. En la pasintaj 16 jaroj ili pagis al la ŝtato imposton de 17.762 miliardoj da juanoj.

● Ĉinio estas granda lando en produktado kaj komercado de mielo. Lastjare naskiĝis en Ĉinio abeloj "Guangfeng n-ro 1" altproduktaj kaj de mielo kaj de abel-reĝina gelato. Fakuloj asertas, ke se duono de la ĉinaj abelaroj konsistos el "Guangfeng n-ro 1", do la jara profito kreskos je pli ol miliardo da juanoj.



En bredejo de la abeloj "Guangfeng n-ro 1"

ARKEOLOGIO

● Lastatempe oni elfosis en la urbo Xining (Ŝjining) de Qinghai(Ĉinghaj)-provinco en nordokcidenta Ĉinio fajncan pelvon kun koloraj desegnoj de dancantoj, faritan antaŭ 5 000 jaroj. Sur la oranĝkolora argila pelvo vidiĝas desegnoj de du grupoj da graciaj dancantoj, el 11 kaj 13 homfiguroj respektive. La vivecaj kaj versimilaj homfiguroj prezentas scenon de la socia vivo de la prauloj en la supra baseno de la Flava Rivero. La pelvo estas grava por esplori

arkeologion kaj la historion de pentrarto kaj dancarto.

MEDICINO

● La Ginekologi-Pediatria Kuracejo, situanta en malriĉa montregiono de Longhua-gubernio, Hebei-provinco, iniciatis en la provinco la unuan sanitaran kaj kompensan fonduson por akuŝintoj kaj infanoj en 1989. De tiam ĝiaj kuracaj ekipaĵoj pliboniĝis kaj multiĝis, granda nombro da akuŝistinoj estis trejnataj plue, la mortokvanto de novnaskitoj de la gubernio estis malpli ol 1.968% kaj tiu de gravedulinoj kaj akuŝantinoj malpli ol 0.063%. De 1994 la kuracejo akceptis 1 200 akuŝantinojn, faris pli ol 2 000 operaciojn kaj tie naskiĝis pli ol 800 beboj. Okazis neniu infekto kaj morto de patrino aŭ novnaskito. En la gubernio ne aperis infana tetanoso nek rakitismo en sinsekvaj 4 jaroj.

KULTURO

● Septembre de 1995, dum la Kvara Monda Virina Konferenco, ĉinaj artistinoj Chen Qingzi (Ĉen Ĉingzi), Li Jianli (Li Ĝjanli), Xu Jin (Ŝju Ĝin), Zhao Yufeng (Ĝaŭ Jufeng) kaj aŭstraliaj artistinoj Carolyn Fitzpatrick kaj Rosalie Waller kune okazigis ekspozicion de siaj belartaĵoj sub la titolo "De Malsamaj Komencoj". Ekspoziciis pli ol 70 belartaĵoj, inkl. de ĉinstilaj pentraĵoj, papertondadoj, olepentaĵoj, skulptaĵoj kaj muraj artpendaĵoj. Tiuj verkoj elspiras kaj la tradician kaj epokan etosojn, kaj estas admirataj per siaj tenera temperamento, belaj strioj, subtilaj desegnoj, mildaj koloroj kaj graciaj figuroj, propraj de virinoj.

● Por konigi diversajn talentulojn en

La kolora lignogravuraĵo "Orienta Virino" farita de s-ino Li Jianli



la moderna Ĉinio, la Ĉina Personara Eldonejo aperigos serion da vortaroj de eminentaj fakuloj. En ili legiĝos tekstoj pri ĉinaj fakuloj kaj teknikistoj okupiĝantaj pri diversaj profesioj. Materialoj de ili estos aŭtentikaj kaj kompletaj. La unuaj tri kompilitaj estos “Nomoj de Ĉefinĝenieroj, Ĉefkontistoj, Ĉefekonomikistoj kaj Ĉefredaktoroj de Ĉinio”, “Nomoj de Altrangaj Fakuloj de Ĉinio” kaj “Nomoj de Mezgradaj Fakuloj de Ĉinio”.

● Kaligrafajo dekmil m longa, verkita de juna kaligrafo Li Jianmin (Li Ĝjanmin) de la Guangxi(Gŭangŝji)-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono, estis eksponata en Pekino antaŭ nelonge. La verkinto per la tradicia ĉina kaligrafio kaj ilustraĵoj kaligrafis en ĝi kompletajn tekstojn de la romanoj “Ĉe Akvorando”, “Pilgrimado al la Okcidento”, “Tri Regnoj” kaj “Ruĝdoma Songo”. La kaligrafajo estas grandioza kun homfiguroj versimilaj.

● La pekina opero estas honorita kiel la nacia trezoro de Ĉinio, kaj Mei-skolo estas unu el la ĉefaj skoloj de la pekina opero. Nun Mei Baojiu (Mej Baŭĝiŭ), filo de Mei Lanfang, majstro de la opero kaj fondinto de Mei-skolo, refondis la Pekinoperan Trupon de Mei Lanfang. Li funkcias kiel ĝia estro.

La trupo fondiĝis unue en aŭgusto de 1922 surbaze de la teatra societo Chenghua organizita de s-ro Mei Lanfang. En dek jaroj post sia fondiĝo la trupo prezentis dekelke da famaj Mei-skolaj dramoj, kiaj “Lasta Vido” kaj “Belulino Xishi (Ŝjiŝi)”. Post kelkfoja prospero kaj malprospero ĝi aliĝis al la Pekin-opera Trupo de Pekino en 1963. La nove fondita Mei-skola trupo ĉefe prezentos Mei-skolajn dramojn, heredos kaj disvolvos la ludarton de la ĉina pekina opero kun Mei Lanfang kiel la reprezentanto.

● La 86-jara emerita instruisto Ren Bingjun (Ĵen Bingĝjun) de Haihe-mezlernejo de Tianjin (Tjanĝin) laboris kiel instruisto 51 jarojn. En ĉ. unu jarcento, de lia patro s-ro Ren Pinzhi, kiu okupiĝis pri instruado sisteme en Tianjin, ĝis nun 25 personoj de 4 generacioj de lia familio laboris kaj laboras kiel instruistoj, 7 el ili funkciis kiel lernejestro.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Helicoformaj algoj, kiel fotosinteza planto plej frue aperinta en la mondo, estas senmorta vivformo. Ĝi enhavas proteinojn je 60-70%, diversajn aminoacidojn kaj vitaminojn bezonatajn de la homoj kaj estas honorita kiel altklasa verda manĝaĵo de la 21-a jc.

Nun Ĉinio produktas multspecajn komercaĵojn el helicoformaj algoj, inkl. de medicinaj kaj sanigaj manĝaĵoj, kaj fondis pli ol 30 fabrikojn, kiuj ĉiujare produktas ĉ. 500 tunojn da seka pulvoro de tiaj algoj. Lastatempe Jiangxi-(Ĝjangŝji)-provinco sukcese produktis la triageneracian altproduktan fotosintezan reakcilon de helicoformaj algoj. Dank’ al ĝi oni sukcese solvis multajn malfacilojn en produktado de helicoformaj algoj, kiaj granda investo kaj alta konsumado de energio, kaj estas laŭdata de mondfamaj fakuloj de Germanio k.a.

● Ĉinio elfaris homo-portantan aerŝipon, kiu altas je 13.2 m kaj longas je 39 m. Ĝia maksimuma rapido estas 85 km hore kaj maksimuma flugalto — 3 000 m. La aerŝipo, ovala, malmola kaj blanka, flugis super Pekino dum la Kvara Monda Virina Konferenco en la lasta septembro. Ĝi estos uzata de la venontaj grandaj internaciaj konferencoj. Ĝi povas esti uzata ankaŭ en fotografado, prospektorado, scienca esplorado, transportado kaj telekomunikado.

S-ro Mei Baojiu



Aerŝipo fluganta super Pekino



DU NOVAJ SPECIOJ DE PANDO

Nun en la tuta mondo vivas ĉ. 1 000 grandaj pandoj, el kiuj 219 vivas en zooj kaj institutoj. Estas tri specioj de ili.

La grandaj pandoj estas raraj sovaĝaj bestoj. Ili vivas ekskluzive en Ĉinio. Tia besto aperis jam antaŭ tri milionoj da jaroj kaj oni nomas ilin vivaj fosilioj. Ili vivas ĉefe en la provincoj Sichuan, Shaanxi (Ŝenŝji) kaj Gansu. Oni trovis tri speciojn da grandaj pandoj inter la pandaj familioj en Foping-gubernio, Shaanxi-provinco.

La unua specio estas nigra-blanka granda pando. Ĝi estas ofte vidata en ĉinaj kaj alilandaj zooj.

La dua specio estas bruna. De 1985 ĝis 1991 oni trovis tri tiajn pandojn en la loko. Tia pando estas bruna ĉe la oreloj, orbitoj, okulharoj, ŝultroj kaj membroj. Fakuloj de la Pekina Universitato nomas ilin la plej belaj pandoj en la mondo.

La tria specio estas blanka. Ĝi estas tute blanka, escepte de la orbitoj kaj malsupraj partoj de la membroj.

ĈINA VILAĜA KURACISTO PREMIITA PER MEDALO DE UN

S-ro Chen Lisen, kampara kuracisto, inventis specifan topikon por kuraci diversajn malfacile kuraceblajn dermozojn. Dank' al tio li gajnis la medalon Stelo de Novaj Teknikaj Fruktoj donitan de UN.

Psoriazo estas malfacile kuracebla dermozo. Ĝia resanigebla procento estas nur 30%, el kiuj 90% havas recidivon. S-ro Chen inventis pli ol 10 specojn da specifaj topikoj, kiuj estas tre efikaj por kuraco de psoriazo. Aplikinte tiajn medikamentojn, pli ol 80% de la psoriazuloj resaniĝis kaj nur kvinono de ili estas atakita de recidivo. Se oni dufoje resaniĝis, aplikinte la medikamenton, oni do tre malofte denove malsaniĝas je psoriazo.

La 23-jara ĉindevena usonano Lin estis bela fraŭlino. Ŝi tamen estis multe turmentita de psoriazo. En la pasintaj 15 jaroj ŝi vizitis multajn hospitalojn en Usono, sed ne ricevis kontentigan efikon en la kuraco. Ŝi do revenis al Ĉinio por konsulti kuraciston. Ŝi informiĝis pri kuracisto Chen kaj veturis en la vilaĝon, kie li laboris. Neatendite, malpli ol unu semajnon poste, ŝia malsano multe mildiĝis. Ŝi ĝoje diris: "Mi certe diskonigos en Usono la kuracarton de doktoro Chen."

En 1951 la 18-jara Chen Lisen enviciĝis inter la medicinistoj. En 1954 li kontaktiĝis kun multaj haŭtmalsanuloj en kamparaj hospitaloj. Li mult-

foje profundiĝis en la popolamason por kolekti popolajn receptojn kaj faris provon sur sia propra korpo. Post longtempa provado, en 1968 li sukcesis en farado de specifa topiko 6801, kiu povis resanigi 93% de tiaj malsanuloj. Liaj specifaj topikoj 6801 kaj 7501 gajnis ŝtatan patenton kaj multajn medalojn.

ĈINA VESTO-INDUSTRIO EN DISVOLVIGO

En la '95-a Internacia Vesta Foiro okazinta antaŭ nelonge, koncernaj fakuloj faris varman diskuton pri la ĉina vesto-industrio antaŭ la 21-a jc. I. IOM POST IOM FORMIĜIS GRANDA VESTO-INDUSTRIO

La tiel nomata granda vesto-industrio estas industria ĉeno formita surbaze de produktado de ĉiaj vestoj kaj pli ol 30 koncernaj fakaj entreprenoj kaj komercaj industrioj. Ĉinio estas granda lando de vesto-produktado. En la granda vesto-industria sistemo funkcias 81 578 entreprenoj kun pli ol naŭ milionoj da laboristoj. La totala jara produktovoloro de la industrio estas 170 miliardoj da juanoj.

En formado de la moderna industria sistemo, la monotona regado de la urbaj entreprenoj fariĝis tiu triopa de la vilaĝaj entreprenoj, urbaj entreprenoj kaj entreprenoj investitaj kune de ĉinoj kaj eksterlandanoj. Koncernaj fakuloj opinias, ke en la estonteco, kiam la ĉina vesto-industrio kaj ĉemaraj entreprenoj disvolvos sin al aliaj lokoj de Ĉinio, aperos fenomeno, ke la entreprenoj investitaj kune de ĉinoj kaj eksterlandanoj investos ankaŭ aliajn entreprenojn.

II. LA STRATEGIO DE FAMAJ MARKOJ DONONTA NOVAN AVANTAĜON

Aŭtoritatuloj diris, ke vizaĝe al la defio de la 21-a jc. la Ĝenerala Kompanio de Ĉina Vesto-industrio kaj Ĉina Federacio de Vestaj Entreprenejoj alprenos la strategion de famaj markoj:

— Fari rekomendadon de serioj da vestoj kun famaj markoj, produkti 10 specojn da vestoj kun famaj markoj vendotaj en la internacia merkato kaj 100 specojn da vestoj kun famaj markoj rekonitaj en la ĉina merkato.

— Fondi komercan centron de fajnaj ĉinaj vestoj kun famaj markoj, kie estos vendejo, ekspoziciejo, kvalita ekzamenejo, informa servo kaj komerca intertraktejo.

— Starigi specialajn vendejojn de vestoj, ornamaĵoj kaj ŝtofoj kun famaj markoj.

Nun nemalmultaj entreprenoj de Ĉinio povas produkti en nur 5-6 jaroj vestojn kun famaj markoj ŝatataj de alilandaj klientoj.

Ŝipista familio sur Huaihe-rivero

EN sudorienta Henan-provinco estas la malgranda urbo Huaibin, kaj sude de la urbo fluas Huaihe-rivero. Ĉe la norda bordo haltas multaj ŝipoj grandaj kaj malgrandaj, kaj sur la ŝipoj oni naskiĝas, kreskas, laboras, edziĝas kaj ricevas infanojn.

Pere de tremanta pastabulo mi paŝis sur la ŝipon de ŝipisto Niu Xueren (Niū Šjūejēn). La ŝipo estas cementa kaj havas la kapaciton de 60 toneloj. Sur la ferdeko estas kasteleto, kaj malsupre, sub la ferdeko, malluksa ŝranko, lito kaj diversaj objektoj. En la kasteleto estas forno, akvovazo kaj kuiriloj. La ŝipmastro Niu sidis sur planko, kun kruroj krucitaj. Li rigardadis la nepon manĝantan malgrandajn salikokojn. “Nun en la rivero jam ne vivas fiŝoj,” diris la maljunulo. “Ni vivtenas nin per surakva transportado, kaj hodiaŭ mi kaptis kelke da malgrandaj salikokoj nur por distri la infanon.” La knabeto,

4-jara, estis alligita al la ŝipo per zono el ruĝa ŝtofo. Li manĝis salikokojn kaj samtempe manĝigis grandan nigran katon per ili, kaj ankaŭ la kato estis alligita al la ŝipo per fera ĉeno. La maljunulo diris al mi, ke ĉiuj infanoj sur la ŝipoj kreskadas en ligado. Antaŭe oni alligis kalabason al la dorso de beboj, por ke ili ne dronu, se ili falos en la riveron eventuale.

Pluraj generacioj de Niu-familio vivis sur ŝipo. “Nia familio ne posedas kampon nek domon, sed havas nur ŝipon. Ni vagadas kun la ŝipo.” Tion diris la maljunulo en trankvileco. Sed fakte, li ĉiam sopiras al sia hejmloko, tial li regule revenadas al ĝi. Nun li revenis al la hejmloko, kaj al li venis liaj unua filino Zhiyun, bofilo kaj nepo. La filino aĝis 30 jarojn. Antaŭ kelke da jaroj ŝi edziniĝis al ŝipisto. Ŝi kaj ŝia patro okupiĝis pri transportado sur la sama rivero, sed ili ne povis ofte renkontiĝi. Tial la vizito de la filina fam-


ilio faris al Niu grandan plezuron. Li sendis la filon aĉeti vinon kaj viandon por regali la filinan familion.

Zhiyun konfidis sian filon al la patro kaj iris helpi la patrinon prepari tagmanĝon. Post longa nevizado la patrino kaj la filino havis nefineblan interparoladon. Tiu-tempe venis Bofratino la Kvina de la maljunulo kaj ŝia nepino.

Bofratino la Kvina estas parolema. Ŝi diris al mi: “Ne estas facila la vivo de la ŝipistoj. Antaŭe sur la rivero veturis nur malgrandaj lignaj ŝipoj sen motoro. Kiam la ŝipo veturis kontraŭ fluo, la tuta familio kaj eĉ tiel malgranda infano devis haŭli ĝin.” Tion dirante, ŝi montris sian 9-jaran nepinon Chunyan. “La plej terura minaco por ŝipveturado estas ventego. Foje, leviĝis ventego sur Hongzelaĝo, kaj pereis 7 ŝipoj... Katastrofo pereigas ĉion en dek minutoj. Oni povos vivi sendanĝere la tutan vivon, krom se lin atakos katastrofo.”

La ŝipanoj observas diversajn kutimojn por beni sekurecon. Ekzemple, ili malŝatas la vorton “renversiĝi”; la membroj de la familio ne devas iri sur alies ŝipon en 3 tagoj post la naskiĝo de bebo; ĉe la novjara tago la ŝipanoj devas aĉeti ruĝan paperon, skribi sur ĝi benajn vortojn kaj glui ĝin sur la pruo kaj pordo de la kajuto; ĉe lanĉo de nova ŝipo oni devas eksplodigi dekmilojn da petardoj...

Parolante pri nova ŝipo la bofratino montris grandan ĝojon. Ŝi diris, ke la plej granda deziro de la ŝipistoj estas posedi centtonelan ŝtalan ŝipon. Malgranda ŝipo ne



Niu Xueren kaj lia Bofratino la Kvina en la ŝipo

Reago al Fondaĵo EPC-abono

Ĉi-sube ni listigas la donacojn al Fondaĵo EPC-abono ricev-
itajn de majo ĝis oktobro 1995.

Belgio: M. A. Alberto (50,00 BEF). **Brazilo:** Alice Amalia Klein (5,00 USD). **Britio:** M. Rutter (7,00 GBP). **Ĉinio:** Liu Bingjun (100,00 juanoj). **Francio:** Eric Bernard Coffinet (100,00 FRF). **Germanio:** Ursula Brenner (50,00 DEM); Alfred Court (4,00 USD). **Hispanio:** P. M. Banga (10,00 USD); Félix Gómez Martín (26,00 USD). **Italio:** Giorgio Bianchi (1000,00 ITL); Gallo Lassere Paolo (32000,00 ITL). **Japanio:** Katoo Ivao (10000,00 JPY); Mori Singo (212,00 NLG). **Nederlando:** J. H. Erasmus (60,00 FIM); S.T. Pentinga (25,00 NGL). **Pollando:** Kristyna Babian (100,00 USD); Aniela Perzak (8 IRK). **Svislando:** Leonie Sennhauser (4,00 USD).

Multajn dankojn al ĉiuj donacintoj!

La Red.

GALERIO

Bronza artaĵo

de RUAN HAIYING

Yunnan estas provinco en la sudokcidenta limregiono de Ĉinio. Tie loĝas multaj ĉinaj nacimalplimulto, kiuj kreis sian nacian kulturon, multe influate de la kulturo de la centra parto de Ĉinio jam de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.). Tie oni faris multajn elegantajn bronzaĵojn.

La artaĵo paro da orumitaj bronzaĵoj dancantoj estis elterigita en Jinning-gubernio, Yunnan-provinco. Ĝi, 12 cm alta kaj 18.5 cm larĝa, estas simple farita. La dancantoj kun longa spado ĉe la talio kaj kun teleroj en la manoj, starante sur giganta boao, dancas vigle antikvan nacian dancon kun levita kapo kaj fleksita korpo, akompanate de tamburado kun forta takto. Tiu nacimalplimulta bronza artaĵo montras ne nur la delikatan arton, sed ankaŭ la antikvan kulturon kaj nacian moron de Yunnan-provinco.


havas grandan kapaciton nek povas rezisti kontraŭ ventego, dum la granda multe transportas kaj povas elteni ventegon. Nun ŝia familio jam havigis al si per monprunto grandan ŝtalan ŝipon de 200 toneloj. En la ŝipo estas salono, dormkajutoj, manĝejo kaj tualetejo, kaj la planko estas kahelita. La kajutoj estas provizitaj per luksaj litoj, kanapo, ŝrankaro, televidilo, fridujo... Krome, la tualetejo estas ekipita per varma duŝilo.

“Kiel iras via negoco?” mi demandis Bofratinon la Kvinan. Ŝi diris, ke ŝi baldaŭ kvitiĝos je la ŝuldo. Ŝi longe vivis sur ŝipo kune kun siaj edzo, filo kaj bofilino. “Kion vi preferus, ĉu sur ŝipo aŭ sur bordo?” La maljunulo Niu respondis al mi: “Prefere sur ŝipo. Sur la bordo mi havis nenion por fari, do mi eniĝis.” Sed la bofra-

tino ne samopiniis. “Sed kie la infanoj lernos vagante sur la ŝipo? Nu, neniu el la 3 infanoj de Xueren vizitis lernejon...” La maljunulo kapjese diris: “Antaŭe la ŝipoj estis disponataj de la kolektivo, kaj ni havis surŝipan elementan lernejon. Sed nun la ŝipoj estas disponataj de individuoj, kaj oni veturas ĉien por gajni pli da mono, sed la infanoj ne povas kolektiĝi kune kaj ĉesis funkcii la surŝipa elementa lernejo.” Li karesis la kapon de la nepo. Post unu aŭ du jaroj tiu ĉi knabo devos viziti lernejon. Nun la familio ne havas pli grandan ŝipon, kaj la maljunulo bezonas grandan sumon da mono por konstrui domon.

Ĉe la adiaŭo Bofratino la Kvinan donis al mi sian adreson promesante, ke ŝi kondukos min al la ŝipo de sia filo, kiam mi refoje vizitos ŝin. ■





La Riverrigarda Kiosko sur Lushan-monto

Foto de **LIU SIGONG**

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第一期

(本刊代号:二——九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2